

1978 majo

71-a jaro


n-ro 869 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



UK: Internacia lingvo — internacia edukado



IJK: Esperanto kaj interjunulara amikeco

Vi trovos

ke poŝtistoj, kiuj efektive strikis lastatempe en Belgio (vojo por ekspedi la revuon al la plimulto de niaj legantoj), tamen ne kulpas pri la malfruigo de ĉi tiu revunumero. Jen konfeso: Kulpas ni ĉi tie en la redakto. Strange tamen estas paroli pri kulpo nia, ĉar estas dimanĉo (la 7a de majo) nun, kiam ni je la 14,45 (laŭ la somera mez-eŭropa tempo) kompostas ĉi tiun linion. Ni estis ĉi tie ankaŭ hieraŭ. Okazis tiel, ke la ampleksa marta numero iom fuŝis niajn limdatojn. Poste venis la estrarkunsido kaj, kiel kutime, efikis tertreme al la rutinaj laboroj en la Oficejo, ĉar kiel ajn utilaj kaj fruktodonaj tiuj kunsidoj estas por la Asocio kaj Movado, ili ĉiufoje sukcesas paneigi la Oficejon dum plena semajno. Tamen, la ĉefa ĝeno kaj kaŭzo de la malfruigo estas enhospitaligo de nia administrantino Sija van Wijngaarden, kiu jam pli ol dudek jarojn prizorgas ankaŭ la adresaron de niaj legantoj. Nun ni devis fari ankaŭ ŝian laboron, kun amaso da kapdoloroj pro la manko de spertoj. Nu, iel ni elturniĝis kaj jen via numero, kiun ni espereble ne misadresis. Cetere, majo estas tre bela eĉ en la monda havenego Roterdamo. Nia ĝardeno deloge floras. Ĝis!

Enhavo

- 89 Aprila estrarkunsido: Fari sian laboron signifas ne fari sufiĉe (S.M.)
- 90 Direktoro de Unesko pri Esperanto
- 91 Taskaro prioritata de la Estraro de UEA por la oficperiodo 1977/1980
- 92 Kongresa ĉeftemo por Varno: Internacia lingvo — internacia edukado (Andrzej Pettyn)
- 93 Fondaĵo Evolulandoj: Proponoj atendataj
- 94 Afriko: Ĉu Afriko bezonas Esperanton nun? (Bernard Golden); Jubileaj donacoj
- 96 La lingvo: Prefikso mal- en la matematika terminologio (F. Lo Jacomo)
- 98 Recenzoj: "La kaŝita vivo de Zamenhof" (M. Boulton); "El la vivo" (C. Conterno); "Malmalice" (B. Ragnarsson); "Internacia lingvistika simpozio, Kumrovec 1975" (P.G. Forster); "Nocioj pri ornitologio" (G.F. Makkink); "Verda robo" kaj "Fianĉo de l' sorto" (F. Simonnet)
- 101 Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 102 34a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Amikeco kiel temo kaj praktiko (S. MacGill); Studentaj grupoj (O.G.)
- 103 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 63a Universala Kongreso en Varno)
- 104 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 106 Esperanto en radio — kompleta tabelo (Georges Larglantier)
- 107 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de UEA; Malfrua Jarlibro; Ekzameno E (Bernard Golden)
- 108 Anoncetoj

La kovrilo

Parto de niaj junaj legantoj ĝojos legi la sekvajn frazojn: Laŭ la datoj kaj ĉeftemoj de la ĉi-jaraj Universala kaj Junulara Kongresoj oni povas fari jenan konstaton: Unue pluraj centoj da gejunuloj praktikos la internacian amikecon en Veliko Tarnovo, inter la 22a kaj 29a de julio, kaj poste pluraj miloj da kongresanoj en Varno, inter la 29a de julio kaj 5a de aŭgusto, diskutos pri la fundamento de la internacia amikeco — internacia edukado. Unue do praktiko, kaj poste teoriaj konsideroj, unue la junularo, kaj poste la resto de la Movado. Tiu ordo ŝajnas ĝusta el pluraj vidpunktoj, interalie, pro la fakto, ke la gejunuloj irontaj al Veliko Tarnovo jam komprenis la esencon de la kongresa ĉeftemo por Varno, ili jam akiris, plejparte memlerne, tiun internacian edukon, kiu ebligas al ili praktiki la internacian amikecon. Ĝenerale, la junularo de la hodiaŭa mondo estas jam unu internacia fenomeno, kiu pro multaj komunaj trajtoj malfacile toleras landajn kaj naciajn limojn. Pri la du kongresaj ĉeftemoj vidu la paĝojn 92, 93 kaj 102.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro:

33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milańówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Fari sian laboron signifas ne fari sufiĉe

EL LA TRI KUNSIDOJ ĉiujare (januaro, aprilo, aŭgusto) la aprila kunsido de la Estraro de UEA tradicie montriĝas esti la plej grava. Tiu kunsido regule definitivigas la spezokonton kaj bilancon de la Asocio por la antaŭa jaro, traktas la Estraran Raporton, decidas pri la programo de la sekva kaj akceptas spezokonton de la antaŭa Universalaj Kongresoj, finpoluras la projekton de la buĝeto de UEA por la posta jaro ktp. Tamen, kiel ajn ĉiuj menciitaj temoj rolis en la estrarkunsido, okazinta inter la 21a kaj 23a de aprilo 1978 en la Centra Oficejo en Roterdamo, neniue ili trudiĝis kiel ĉi-kunsida ĉefokupo de la Estraro. Anstataŭe, pluraj aliaj temoj ĉefrolis aŭ egalrangis kun tiuj tradiciaj eroj de la aprila tagordo. Oni amplekse traktis ankaŭ jenon: Afriko, turismo, agadplano, statutprojektoj de UEA kaj TEJO, landa kaj faka agado, delegitaro, estontaj kongresoj.

Kun afrikanoj pri Esperanto en Afriko

Se la januara kunsido — pro la raporto de s-ino Ursula Grattapaglia, kiu tiam estis ĵus farinta vojaĝon tra naŭ sudamerikaj landoj — povis porti epiteton "sudamerika", la aprila kunsido povus havi kromdifinon "afrika". Eluzante iliajn favorajn vojaĝeblecojn, la Estraro invitis s-rojn Rakotondravao kaj Raveloson el Madagaskaro gastigi dum la kunsidaj tagoj en Roterdamo. Kvankam la du gastoj ĉeestis nur parton de la kunsido, diskutoj pri Esperanto en Afriko kaj Madagaskaro daŭris dum tri tagoj ankaŭ en pluraj eksterkunsidaj renkontiĝoj. Estas nun malfacile difini la rezultojn de tiu priafrika diskutado. Tamen, la vizito havis gravan informan karakteron en ambaŭ direktoj kaj pluraj



S-ro E. Raveloson: Pledo por pli da atento al Afriko.

aspektoj de la Movado en Madagaskaro estas nun pli klaraj ol antaŭe. Landa asocio tie ekzistas jam dekon da jaroj nur surpapere. La landan Movadon ĝenas iom da lokaj malakordiĝoj. Kvankam ĉiujare la lingvon lernas nova cento da interesitoj, estas malfacile teni ilian intereson. Mankas internaciaj movadaj kontaktoj. Tial la gastoj venis al Roterdamo kun firma deziro reiri hejmen kun decido, ke unu el la venontaj Universalaj Kongresoj okazu en tiu sudhemisfera lando. Spite la principan bonvolon, la Estraro ankoraŭ ne kuraĝis fari tian decidon, ĉar — aldone al aliaj problemoj — nek la disponeblaj ejoj nek la lokaj laborfortoj povus en la plej proksima estonteco garantii en Madagaskaro sukcesan organizon de la plej granda movada aranĝo. Anstataŭe, la Estraro faris plurajn komisionojn esplori eblecojn de aliaj, malpli grandaj, movadaj aranĝoj en tiu lando. Oni esploras ĉe diversaj registaroj, internaciaj organizaĵoj kaj junularaj fondaĵoj ŝancojn de financa subteno por tiaj projektoj. Post la vizito, kiun fine de marto ĉi-jare al Madagaskaro faris kelkaj funkciuloj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kaj interkonsento en 1980 okazigi ILEI-konferencon en Madagaskaro, la Estraro decidis apogi tiun aranĝon. Krome, UEA pretus financi apartan informilon por afrikaj esperantistoj, kiun oni eldonus kaj distribuus el Madagaskaro. S-ro Raveloson detaligos tiurilatajn planojn, kune kun d-ro Corsetti, komisiito de UEA pri la Movado en la Tria Mondo.

La kunsido, kiun, krom s-ino Grattapaglia, ĉeestis ĉiuj aliaj estraranoj kaj pluraj oficistoj de la Centra Oficejo, amplekse traktis ankaŭ la movadan turismon. Tiun parton de la kunsido ĉeestis ankaŭ mag. Andrzej Grzębowski, komitatano kaj membro de la koncerna komitata komisiono. La Estraro diskutis ĉefe la eblecojn intensigi kaj kunordigi diversajn entreprenojn sur la turisma laborkampo. Tamen, rilate la turismon ankoraŭ restas sen respondo la esenca demando: Kiel la Movado povus profiti el miloj da turismaj vojaĝoj de esperantistoj, kiuj ĉiujare aliĝas al aranĝoj proponataj de la profesiaj turismaj agentejoj?

Projektoj de du novaj statutoj

Jam en la januara kunsido la Estraro traktis projekton de la nova statuto de TEJO. Ĝi revenis al la tagordo pro kelkaj precizigoj kaj nun iras al la Komitato de UEA por fina ratifo. Sen hasto, kiun en 1974/75 kaŭzis la neceso rapide plilongigi la validecon de la nuna Statuto de UEA, la Estraro nun havis antaŭ si novan statutprojekton, kiel rezulton de sufiĉe ampleksaj laboro kaj diskutoj tiurilataj. La Estraro decidis plustudi la projekton antaŭ ol diskutigi ĝin unue en la Komitato, poste antaŭ la tuta membraro kaj denove en la Komitato, por ke fine la tuta membraro voĉdonu pri ĝi.

Jam en Varno la Komitato traktos la aliĝpeton de Malta Esperanto-Societo kaj verŝajne ankaŭ tiun de Venezuela Esperanto-Asocio, se la necesa dokumentaro kompletigos ĝustatempe. Krome, antaŭ la



Estraranoj Pettyn, Tonkin kaj Maertens dum la kunsido

Estraro troviĝas kvar pliaj aliĝpetoj (tri estas ekster-eŭropaj), pri kiuj ne eblis esprimiĝi dum la kunsido, ĉar mankis pluraj gravaj dokumentoj. Tamen, restas akcentinda tiurilata kreskotendenco de la Asocio.

Kongresaj temoj postulis ampleksan prilaboron, ĉefe pro la amasa aliĝado al la 63a UK en Varno, kio siavice levas grandajn financajn problemojn pro limigitaj transpagaj eblecoj inter Bulgario kaj Nederlando. Ĉio ĉi postulas senĉesan reviziadon de la kongresa buĝeto. Tamen, la kongresaj preparoj evoluas kontentige kaj ekzistas pluraj espero, ke ni ĉi-jare spertos amasan kaj gravan Universalan Kongreson. En ĝia tria riĉa programo aperos ankaŭ la ero "La Estraro prezentigas", aranĝo vekinta grandan intereson en Rejkjaviko, sed preteratentita en nia septembra numero pasintjare.

Oni diskutis ankaŭ pri la postaj kongresoj: Lucerno (1979), Stokholmo (1980) kaj Brazilio (1981). Precipe la preparoj por la 64a UK en Lucerno progresis ĝis preskaŭ "ĝene" bona nivelo, ĉar la svisoj jam solvis plurajn demandojn pri la venontjara UK, kiujn oni ankoraŭ provas solvi por la ĉi-jara Kongreso en Varno.

Kontentigaj financaj rezultoj en 1977

El la financaj tabeloj, kiuj aperos en la kadro de la Estrara Raporto 1977/78 en la junia numero de ĉi tiu revuo, vi povos konstati, ke ankaŭ la jaro 1977 finiĝis per malgranda profito (male al nia timo en la februara numero, ke la Asocio povus noti negravan deficiton). Tio rilatas la spezokonton por la pasinta jaro. Dume, la bilanco en la fino de 1977 montras plian signifan kreskon de la asocia kapitalo, kio sendube estas la plej bona signo pri la sana stato de la financoj de UEA. La Estraro faris plurajn financajn decidojn, kiuj ne estas aparte interesaj por nia legantaro, krom tiu rilatanta la eldonadon *UN kaj ni*, kies abonkosto malaltiĝos venontjare al duono de la kotizo en la kategorio Membro kun Jarlibro. Tamen, ĝis la fino de ĉi tiu jaro, la abono al *UN kaj ni* plue kostos 22,00 guldenojn por dek numeroj.

Inter la aliaj estraraj decidoj ni menciis la akcepton de la romano *Aniara*, ĉefverko de la sveda nobelpremiito H. Martinsson (traduko de B. Nilsson kaj W. Auld), en la eldonserion "Oriento-Okcidento". Tiu verko

aperos ĉe la sveda Eldona Societo Esperanto. Estrarano Andrzej Pettyn informis, ke la 3a eldono de la fama epopeo de A. Mickiewicz, *Sinjoro Tadeo*, en ne malpli fama traduko de A. Grabowski, aperos fine de ĉi tiu jaro en Pollando. Tiu ĉefverko jam pli frue estas akceptita en la serion "Oriento-Okcidento", kies revigliĝon anoncis la ĵus aperinta verko de I. Chiussi *Je la flanko de la Profeto*, eldonita de TK en Antverpeno, Belgio.

Kiam estrarkunsido dediĉas pli da tempo al planoj por la estonta agado, ol al solvado de antaŭaj kaj eventuale nunaj problemoj, tio devus esti bona signo pri la ĝenerala stato de UEA. La aprila kunsido havis ĝustetian karakteron. Ĝi konsumis pli da tempo por finredakti la liston de la prioritataj taskoj (vidu aliloke en ĉi tiu numero), ol por akcepti la spezokontojn kaj bilancon. Tamen, la Estraro mem — feliĉe! — ankoraŭ ne kontentas pri sia propra laboro. Tiun pozitivan malkontenton, tiun klopodon kontraŭstari rutinigon, bele esprimis la fermaj vortoj de d-ro Tonkin, de kie ni prunteprenis la titolon por ĉi tiu raporto.

S. Milojević

Direktoro de Unesko pri Esperanto

En Lucerno (Svislando), en la sama kongresa domo kie en 1979 okazos la 64a Universala Kongreso de Esperanto, estis organizita en la fino de marto la 13a Monda Kongreso de la Internacia Federacio de Instruistoj de Fremdaj Lingvoj (FIPLV). Ĉeestis 600 kongresanoj, kiuj diskutis pri problemoj kaj metodoj de la instruado de fremdaj lingvoj. En la centro de la kongresaj laboroj faris prelegon la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou Mahtar M'Bow. Li diris, ke la ŝtatoj kun pluraj lingvoj estas pli oftaj ol la unulingvaj ŝtatoj, kaj li pledis por edukado en pluraj lingvoj. Post la prelego li deklaris sin preta respondi demandojn el la publiko. D-ro Arthur Baur, kiu ĉeestis kiel ĵurnalisto, tiam demandis s-ron M'Bow, kial li, kiu ĉeestis kaj alparolis la 62an UK en Rejkjaviko en 1977 kaj tial estas bone informita pri Esperanto, ne menciis tiun solvon de la lingva demando. Kelkaj el la ĉeestantoj ridis post tiu elpaŝo, sed ili verŝajne tiom pli miris, ke s-ro M'Bow tute ne prenis la demandon kiel bagatelan flankadon, sed tre afable kaj detale respondis. Li diris, ke li ne menciis Esperanton, ĉar li ankaŭ neniun alian lingvon menciis (kio estas vera), sed ke li efektive observis la laboron de la esperantistoj en Rejkjaviko kaj opinias, ke iliaj ideoj meritas seriozan konsideron kaj atenton. La ekzaktaj vortoj de la ĝenerala direktoro de Unesko ne estas notitaj, sed ilia ĝenerala tendenco estis tre pozitiva por Esperanto. La proksiman tagon d-ro Baur renkontis s-ron M'Bow ankoraŭfoje okaze de la ĝenerala kunveno de la Nacia Svisa Unesko-Komisiono en Zug. Tiam dum mallonga konversacio s-ro M'Bow informiĝis pri la stato de Esperanto en Svislando.

(laŭ *Esperanto-Information*)

Taskaro prioritata

DE LA ESTRARO DE UEA
POR LA OFICPERIODO 1977/1980

Ĉi tiu interna labordokumento de la Estraro, kompreneble, ne celas anstataŭi la Trian Bazan Laborplanon de UEA, sed nur enfokusigi kelkajn erojn de tiu plue valida agadprogramo, akceptita en 1973. Kiel notite sub II.7), la Estraro planas dum ĉi tiu oficperiodo ellabori la Kvaran Bazan Laborplanon de UEA. Tial la ĉapitro III. de ĉi tiu dokumento jam atentigas pri kelkaj aktualaj aspektoj de la asocia vivo, kiujn la ellaborota agadprogramo devus konsideri.

LA ESTRARO elektita en Rejkjaviko kunsidis post sia elektigo kaj decidis pri la ĉefaj laborkampoj, al kiuj ĝiaj membroj sin dediĉos. Tiu labordisdivido estis publikigita en la revuo *Esperanto* de septembro 1977, kie en la adreslisto (ripetata en ĉiu numero de la revuo) estas aldonitaj la taskoj post la nomoj de la novaj estraranoj. La Estraro pritraktis la plej gravajn taskojn, antaŭ kiuj staras la Movado, dum siaj kunsidoj en januaro kaj aprilo 1978. Ĝi konfirmis tiun katalogon de la ĉefaj taskoj deciditaj jam en Rejkjaviko (I), enkondukis en kelkajn el ili konkretigon de la celo, por pliintensigi la laboron al unu el la tuto de la celoj (II), kaj ĝi aldonis diversajn taskojn al la katalogo de la farendaĵoj dum la nuna oficperiodo (III).

I. La Estraro daŭre prilaboras la jenajn ĉefajn laborkampojn:

- 1) Administrado kaj financo
- 2) Financa programo
- 3) Eksteraj rilatoj
- 4) Kulturo
- 5) Kongresoj.

II. La Estraro plue prizorgas la jenajn ĉefajn laborkampojn kaj krome donos specialan atenton en tiu daŭranta ĝenerala prilaborado al la jenaj specifaj taskoj:

- 1) **Landa kaj regiona agado:** Konduki plurajn landajn asociojn al la stato de aliĝinta landa asocio; post preskaŭa kompletigo en Eŭropo, tio nun signifas firme ligi ekstereŭropajn movadojn al UEA kaj progresigi la mondvastecon de UEA.
- 2) **Faka agado:** Helpi al la stabiligo de la fakaj asocioj; iniciati la starigon de fakaj asocioj pri novaj fakoj kaj vigligi pasivajn asociojn; aktivigi la fakan laboron (terminologioj, kunlaborado en neesperantistaj fakaj asocioj kaj ties fakrevuoj).
- 3) **Delegita reto:** Ordigi la sistemon; etendi la reton geografie kaj pritrakti taŭgajn paŝojn por malfermi tiun ĉi unikan servon al internacia publiko, per kio

UEA partoprenus en mondvasta klopodo plibonigi internaciajn rilatojn.

4) **Edukado:** Enketi pri la situacio en eksterlernejaj kaj precipe plenaĝulaj medioj; ellabori laborprincipojn kaj efikajn metodojn; iniciati novajn paŝojn por pli-altigi la lingvo-nivelon de la esperantistoj kaj por kontribui al la disvastigo de Esperanto, speciale en landoj kie ne ekzistas organizita Movado.

5) **Informado:** Helpi al plifortigo de la informaj kapabloj de la landaj asocioj; liveri al ili informojn kaj materialon pri la monda lingvo-problemo, Esperanto kaj ĝia movado; kunordigi komunajn informkampanjojn de UEA kaj de la landaj asocioj.

6) **Turismo:** Inventari la ekzistantan oferton de turismaĵoj per-Esperantaj, kunordigi ilin; klopodi pri dezirataj aldonoj en la oferto, informi, kunlabori kun la tiukampe jam aktivaj regionaj kaj fakaj organizaĵoj kaj krei la organizan bazon por efika kultivado de tiu kampo.

7) **Planado:** Verki proponon por la Kvara Baza Laborplano de UEA, amplekse diskutigi ĝin kaj pretigi ĝin por akcepto de la Komitato en 1980.

III. La Estraro donos prioritatan atenton ankaŭ al la jenaj kampoj:

- 1) Kampanjo de **membro-varbado** en landoj aparte promesplenaj kaj en landoj kun kolektivaj abonoj de la revuo *Esperanto* por, helpe de la tieaj ĉefdelegitoj, gajni Membrojn kun Jarlibro.
- 2) Evoluigo de servoj kaj agadoj allogaj al gejunuloj, por **altigi la nombron de junaj membroj kaj aktivuloj** en la Asocio.
- 3) Kampanjo por akiri **pli da kolektivaj abonoj** de la revuo *Esperanto*, kio utilas al la varbita landa asocio, kies membroj ricevas prestiĝan revuon, kaj al UEA pro la kreskanta eldonkvanto.
- 4) Speciala atento al la situacio de la **virinoj en la Movado** kaj instigo al ili partopreni ankaŭ en gvidaj funkcioj de la Movado sur ĉiuj niveloj.
- 5) **Science bazita argumentado**, pro kio helpo estu donata al sciencaj laboroj en interlingvistiko, esperantologio kaj la sociaj sciencoj; per tiuj laboroj povas esti akirita ankaŭ pli alta reputacio por Esperanto.



Estraranoj Szabó-Felső kaj Auld en la aprila estrarkunsido

Internacia lingvo — internacia edukado

NI VIVAS en mondo, kiu senĉese evoluas, senĉese strebas al perfektigo. En tia mondo kreskas la bezono de konstanta intelekta aktiveco, cele al senĉesa plivastigado kaj profundigado de la homaj scioj, kaj konsekvence — la bezono de edukado dum la tuta vivo. En tiaj cirkonstancoj ni, esperantistoj, per la Internacia Lingvo, klopodas kontribui al tio, ke la senĉesa edukado fariĝu edukado internacia. Ni klopodas persvadi al la neesperantista publiko, ke la plej rekta kaj natura vojo al la internacia edukado kondukas tra la Internacia Lingvo.

Tamen, por atingi pli konkretajn rezultojn en niaj klopodoj, ni devas ankoraŭfoje konsciiĝi, ke ni mem devas esti pli konkretaj, pli perfektaj kaj apliki pli modernajn labormetodojn. Lige kun tio ankaŭ en la Esperanto-movado ĉiam pli klare senteblo fariĝas la bezono de vivodaŭra edukado. Tiu edukado estas fenomeno kun grandega praktika signifo, kaj por la unuopa esperantisto, kaj por la tuta Movado en la monda skalo. Ni devas do disvolvi la motivecon de la vivolonga edukado, same ĉe gejunuloj, kiel ankaŭ ĉe plenkreskuloj. Ĝi fariĝu unu el la ĉeftaskoj de la tuta Esperanto-movado sur ĉiuj ŝtupoj de nia aktiveco. Sed samtempe ni memoru, ke la realigon de ĉi tiu tasko oni povas atingi nur per la kunagado de la tuta esperantistaro, de ĉiuj esperantistaj organizaĵoj, per la integriĝo de la streĉoj de ĉiuj parolantoj de Esperanto. Kaj tial ni devas ellabori, kaj poste konstante perfektigi, pli efikajn ol ĝis nun, metodojn de nia agado en la eduka sfero, ne nur en la lernejoj, sed ankaŭ, tute aparte, en la plenkreskulaj medioj, pri kiuj ni iafoje forgesas. Ni devas diskonigi la utiligeblon de diversaj edukkanaloj kaj laborformoj inter la plenaĝuloj kaj ni transforĝu ilin en la ĉiutagan praktikon.

Dum niaj spertinterŝanĝoj en la kongresaj diskutgrupoj en Varna prezentu vian opinion, liveru viajn proprajn spertojn, proponu novajn iniciatojn kaj entute helpu per via persona kontribuo al la ellaboro de taskoj, kiujn ni ĉiuj realigu en la proksima estonto. Por faciligi la diskutadon en grupoj ni metas ĉi tie demandojn, kiujn oni klopodu antaŭpripensi. Tamen, ni konscias, ke ili tuŝas apenaŭ parteton de la diskutendaj problemoj. Kompletigu do ilin laŭbezone, pliriĉigu nian estontan agadon per viaj propraj ideoj!

1. Memlernado: Kiujn vojojn uzi por popularigi la memlernadon de la lingvo Esperanto? Kion oni faru por

konsciiĝi al niaj agantoj, ke la memlernado ne finiĝas je la memlernado de la lingvo, sed ke tiu memlernado signifas ankaŭ ekkonadon de propagand- kaj varboteknikoj, instrumentoj ktp.? Ĉu oni devus ellabori por la memlernantoj de Esperanto specialajn instru- aŭ lerno-programojn dividitajn je lingvoŝtupoj? Ĉu oni ellaboru bazan principaron de la memlernado de Esperanto? Se jes, kion ĝi enhavu? Ĉu viaopinie valorus popularigi opiniojn kaj spertojn pri la memlernado de diversaj elstaraj konantoj de la lingvo Esperanto? Kio povus pli firme ligi la memlernantojn al la Movado? Ĉu oni organizu specialajn rekontiĝojn, feriadojn ktp.?

2. Studrondoj: Kiel funkcias la studrondoj de Esperanto en diversaj landoj? Kiajn praktikajn spertojn oni havas pri tio? Ĉu oni laboras laŭ iuj lernoprogramoj? Se jes, kion ili enhavas, kiamaniere ili estas prilaboritaj? Ĉu la studrondojn oni povus ankoraŭ pli vaste popularigi kaj samtempe plialtigi ilian nivelon? Kion oni faru por efektiviĝi tion? Ĉu la organizantoj de la studrondoj havu gvidilon en la formo de broŝuro? Se jes, kion ĝi enhavu? Kiaj viaopinie estas la plej efikaj laborformoj en la studrondoj de Esperanto?

3. Korespondaj kursoj: Kiel aktuale funkcias tiaj kursoj en diversaj landoj? Kiajn atingojn oni havas en tiu sfero? Kiamaniere oni povas vastigi tiun instruformon? Ĉu oni sentas la bezonon de internaciaj kursoj korespondaj, ekzemple sur la bazo de la angla, franca aŭ hispana? Ĉu oni organizu internaciajn korespondajn



kursojn por progresintoj nur en Esperanto? Kiajn bezonojn pri tio oni havas? Kiajn praktikajn sugestojn vi povus prezenti ĉi-rilate? Ĉu oni bezonus apartajn internaciajn renkontiĝojn de la korespondaj kursanoj por pli firme ligi ilin al la Movado kaj paroligi ilin? Se jes, kiaj estu la renkontiĝoj?

4. Eksterlernejaj kursoj: Kiel disvolviĝas la eksterlernejaj kursoj en la plenkreskulaj kaj junularaj medioj de diversaj landoj? Instruprogramoj? Spertoj? Laborformoj? Lernolibroj? Ĉu necesas apartaj instrumentoj por tiuj kursoj (aliaj ol en lernejoj)?

5. Varbado al kursoj: Kiujn varboformojn oni aplikas plej ofte? Kiajn rezultojn oni atingas? Plej efikaj

reklam- kaj varb-principoj en via lando? Sugestoj por la estonto? Kiamaniere landa asocio povus evoluigi la varbadon? Taskoj de loka grupo en la porkursa varbado? Praktikaj sugestoj?

6. Novaj parolantoj de Esperanto: Miloj da homoj finas la Esperanto-kursojn. Nur parto el ili membriĝas al la esperantistaj organizaĵoj. Multaj homoj post la kurso-fino ne plu venas al niaj kluboj. Kio estas la kaŭzo de tio? Ĉu la novaj parolantoj de Esperanto bezonas apartan prizorgon? Kion oni faru, por ke ili restu en la Movado kaj integriĝu? Gravega problemo. Pro la ĝisnuna manko de provoj solvi ĝin ni perdas ĉiujare milojn da kandidatoj por membreco en niaj organizaĵoj. Kiajn ĉi-rilatajn sugestojn vi havas? Ja vi mem estis aŭ estas nova parolanto de Esperanto...

7. Esperanto kaj pli aĝaj personoj: Esperanto kiel agrabla kaj utila "tempo-pasigilo". Psikologiaj aspektoj. Kion pensiuloj ne faras, sed povus fari por la Movado? (konsidere al la libera tempo, pri kiu ili disponas)? Kion la Movado povus doni al pensiuloj ene de la Movado kaj ekster ĝi? Viaj sugestoj por la laborformoj kaj iniciatoj en la medioj de pensiuloj? Kiel instrui Esperanton al pli aĝaj homoj?

8. Internacia edukiĝo kaj Esperanto: Kion signifas por la Esperanto-movado la *Rekomendo pri edukado*, kiun en decembro pasintjare Unesko eldonis en Esperanto? Kiel la Internacia Lingvo povas peri al lernantoj (en



kaj ekster lernejoj) internaciajn vidpunktojn kaj valorojn? (Legu kaj kunportu al la Kongreso vian ekzempleron de la *Rekomendo*).

9. Lernado kaj samtempa kleriĝo: Kiel Esperanto povas malfermi al plenaĝaj lernantoj novajn horizontojn en la internacia vivo? Kiel oni povas utiligi Esperanton por pliriĉigi la ĝeneralan sciadon?

10. Esperanto-instruaj perspektivoj kaj problemoj en Afriko: * Konsiderante la multnombrecon de la lingvoj kaj dialektoj en Afriko, tiu kontinento aparte urĝe

bezonas komunan lingvon. Ĝis nun oni tie kutimis pruntepreni eŭropajn lingvojn por interkompreniĝi. Montriĝas, tamen, ke tiuj lingvoj tute ne solvas la problemon. Tial ni esperantistoj havas la devon montri al Afriko la eblon solvi tiun demandon pere de la Internacia Lingvo. Tamen, kiel oni agu por sukcesigi la aferon de Esperanto en Afriko? Kiun labormetodon oni elektu por interesi la afrikanojn pri Esperanto? En kiu medio oni komencu la instruadon de la Internacia Lingvo tie, en aŭ ekster lernejoj? Ĉu la Movado povos — depende de la elektota metodo — disponigi al la afrikanoj taŭgajn, facilajn kaj malmultekostajn instru-materialojn? Kiamaniere neafrikaj esperantistoj povus kontribui al la sukcesigo de la Internacia Lingvo en Afriko?

Preparis:
Andrzej Pettyn

FONDAĴO EVOLULANDOJ:

Proponoj atendataj

LA KOMITATO de UEA en 1976 en Ateno starigis apartan fondaĵon, komence nomitan "Tria Mondo", kiu poste ŝanĝis la nomon al "Fondaĵo Evolulandoj". Post diversaj organizaĵoj, kaj precipe financaj solvend-aĵoj, la Fondaĵo definitive enspezis komencan kapitalon, kio ja ebligis ankaŭ al ĝia estraro ekfunkcii.

Kiel la nomo mem de la Fondaĵo aludas, ĝi havas kiel ĉefan taskon materie subteni ĉiujn projektojn kaj iniciatojn, kiuj celas helpi la Esperanto-movadon en la evolulandoj. Tiurilate specialan konsideron ricevos lerniloj kaj informiloj en pliaj naciaj lingvoj. Temas, ekzemple, pri tiel vastaj lingvaj terenoj kiel la hindia, urdua, malaja, svahila, tamila, haŭsa ktp., kiuj ankoraŭ restas eĉ sen Esperanta ŝlosilo. Kompreneble, ankaŭ alispecaj projektoj ricevos adekvatan priatenton.

Proponojn por financa subteno de konkretaj agadoj rajtas fari diversaj organizaĵoj, institucioj kaj individuoj. La postulon necesas taŭge motivi, prezenti strukturojn de la elspezoj kaj enspezoj (indiki eventualajn kunfinancantojn kaj ties partoprenajn sumojn), informi pri aŭtoroj aŭ organizantoj kaj pri ĉiuj aliaj utilaj detaloj. Ĉion ĉi necesas liveri en **tri ekzempleroj, plej malfrue ĝis la 31a de oktobro 1978**, al unu el la estraranoj de la Fondaĵo:

d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio;

s-ro Kurt Greutert, Via Pizzo di Claro 7, CH-6512 Giubiasco, Svislando;

s-ro Senad Čolić, Halilbašića 23, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

Siajn decidojn la estraro de la Fondaĵo Evolulandoj publikigos en la revuo *Esperanto*.

* Ĉi tiun temon proponis (kaj prezentos dum la Kongreso) Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Ĉu Afriko bezonas Esperanton nun?

Ĉi tiu rapida reago al nia aprila ĉefartikolo enhavas plurajn instruajn atentigojn kaj argumentojn, sed ankaŭ kelkajn danĝerajn ĝeneraligojn kaj facile dementebajn konkludojn. Afriko ŝajne ŝanĝiĝas pli rapide, ol oni supozas. Cetere, same rapide kiel s-ro Golden, al la aprila ĉefartikolo reagis ankaŭ la du afrikanoj, kies opiniojn ni citis en la artikolo. Ili ambaŭ petis pliajn informojn pri Esperanto kaj pri UEA, kio jam estas demento de unu el la ĉefaj tezoj de s-ro Golden. Ni tamen aperigas la sekvantan tekston, kun espero, ke ĝi provokos pliajn reagojn kaj do iom pli funde diskutigos la demandon de Esperanto en Afriko.

KIAM APERIS la artikolo de Renato Corsetti "La ne-plugita kampo" (*Esperanto*, decembro 1974, p. 203-205), mi tuj sidiĝis por surpaperigi miajn komentojn kaj kontraŭargumentojn. Tamen, mi hezitis, opiniante, ke tiu tasko pli ĝuste apartenas al afrika esperantisto, kiu pli profunde konas la situacion de sia kontinento ol mi, kiu pasigis relative mallongan tempon tie. Vane mi atendis: neniu afrikano prikomentis la artikolon de d-ro Corsetti.

Mi jam plurfoje esprimis miajn ideojn pri la rolo de Esperanto en Afriko okaze de interparoladoj kun eŭropaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la temo. Be-daŭrinde, ili ofte ne estas sufiĉe bone informitaj pri la aktuala stato en Afriko kaj opinias, ke oni povas tie enkonduki Esperanton same kiel oni agas tiucele en eŭropaj landoj. En majo 1975 mi prezentis prelegon/ĉe Esperanto-grupo en Győr, Hungario, pri "Problemoj de la nuntempa Afriko". Enkadre de mia pritrakto de la politika, ekonomia kaj socia situacio en diversaj partoj de Afriko, mi montris kiel Esperanto funkciis en tiu kontinento ĝis nun, kaj taksis la ŝancojn por ĝia disvastiĝo en la proksima estonteco.

Mi substrekis, ke la afrikanoj hodiaŭ devas alfronti problemojn multe pli gravajn ol la internacilingvan problemon. Eĉ la demando pri nacia lingvo ne havas la plej altan prioritaton. Antaŭ ĉio la afrikaj landoj devas plej rapide atingi politikan stabilecon, ekonomian memstarecon kaj socian bonfarton. Kaj tio okazos nek morgaŭ, nek postmorgaŭ. Povas esti, ke estos bezonataj pluraj jardekoj, eĉ jarcento.

Miaj propraj spertoj kiel esperantisto en Afriko ne estas tre kuraĝigaj. Mi provis kontakti perletere samideanojn, kies adresojn mi ricevis de UEA, sed la klopodoj ne estis fruktodonaj. Mi sukcesis renkontiĝi kun nur unu esperantisto dum mia restado de tri kaj duona jaroj en Afriko. Li estis brita instruisto laboranta en Dar-es-Salamo, Tanzanio. Kiam ni rendevuis en Nairobi, Kenjo, kaj interŝanĝis vidpunktojn, li asertis, ke Esperanto por la afrikanoj hodiaŭ estas lukso. Mi cent-procente samopiniis kun li. Poste, kiam mi transloĝiĝis al Gano, mi ricevis peton de la afrika komisionano de TEJO, ke mi organizu Esperanto-movadon en Gano. Mi trovis liajn proponojn nerealistaj kaj neefektiveblaj. La sekvan jaron unu el la gvidantoj de Pupteatraj

Internaciaj Festivaloj petis min kunlabori kun ganaj pupistoj, kiuj intencis konkursi en Zagreb. Mi tradukis la teatraĵon kaj komencis instrui la Internacian Lingvon al la trupo. Post la dua leciono ili ĉiuj malaperis!

D-ro Corsetti, leginte raporton pri mia prelego, skribis al mi petante, ke mi informu lin pri miaj ideoj rilate la disvastigon de Esperanto en afrikaj landoj. Mi detale respondis kaj prezentis ankaŭ kritikojn de la teksto de projekto de informa broŝuro destinita prezenti Esperanton en la kadro de la afrikaj lingvo-problemoj.

Pasintan jaron tiu broŝuro kun la titolo *Por la defendo de afrikaj kulturoj* estis eldonita de TEJO en la angla kaj franca versioj. *

Post la legado de "Kontinento kie ni mankas" (*Esperanto*, aprilo 1978, paĝoj 69-70) mi decidis prezenti miajn ideojn pri la temo. Mi zorge legas ĉiujn raportojn en la gazetaro pri Esperanto kaj Afriko kaj mi konstatas, ke pozitivaj rezultoj ankoraŭ mankas, do la vidpunkto, kiun mi esprimis antaŭ tri jaroj ankoraŭ estas subtenebla.

Antaŭ 18 jaroj aperis raporto (*Esperanto*, marto 1960, p. 52) pri seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu pritraktis aziajn kaj afrikajn problemojn kaj la enkondukon de la Internacia Lingvo en tiujn regionojn. La raportinto skribis, ke "Estas nur problemoj kiel enkonduki ĝin". Pli grava demando estas **kial** enkon-

* Havebla ĉe la Libroservo de UEA; prezo: 2,40 gld.

Jubileaj donacoj

Helpopreto kaj oferemo apartenas al la plej rimarkindaj trajtoj de la esperantistaro, ne de hieraŭ, sed tra la tuta historio de la Movado. Fakte, Esperanto travivis siajn unuajn naŭdek jarojn nutrata preskaŭ ekskluzive per la amo de siaj adeptoj. La lasta bela ekzemplo pri tio: Sen ajna alvoko aŭ aludo, pluraj membroj kaj grupoj sendis al la Centra Oficejo centojn da guldenoj, okaze de la 70a datreveno de UEA.

duki ĝin. En 1962 UEA eldonis verkon de Tibor Sekelj en la angla lingvo: *The international language Esperanto – Common language for Africa – Common language for the world*. Liaj argumentoj estas bonaj, sed ĉu troviĝas indikoj, ke tiu broŝuro havis efikon? En 1973 f-ino Tamiko Kaŭakami faris propagandan vojaĝon de unu flanko de Afriko al la alia. Laŭ ŝiaj iom naivaj artikoloj, kiuj aperis en *Heroldo de Esperanto* (1973, n-ro 1551, p.3 kaj n-ro 1552, p.3), estas evidente, ke ankaŭ ŝia mesaĝo rapide forvaporigis en la varma tropika aero. Lastatempe "reĝo" Parzival venis por ripeti la fiaskojn de siaj antaŭuloj.

Kial, post 90 jaroj, Esperanto ne enradikiĝis en Afriko? Ĉu ĝi vere povas enradikiĝi tie? Jen du pripensindaj demandoj. Ne estas necese fari komplikajn statistikan



Multaj problemoj por solvi en Afriko: Ĉu Esperanto estas solvo por kelkaj el ili aŭ ĝi nuntempe estas "lukso"?

analizon por vidi la aktualan tendencon en Afriko en 1959 kaj en 1974. Nun mi aldonas informojn pri 1977. La fontoj estas *Esperanto* kaj *Jarlibro de UEA*.

	1959	1974	1977
Afrikaj landoj kun esperantistoj	17	19	13
Individuaj membroj (UEA)	97	62	56
Lokoj kun delegitoj	31	15	11
Landaj asocioj	1	5	3

Tiu ĉi tabelo montras, ke la Esperanto-movado en Afriko ja ne stagnas – ĝi regresas.

Mia esploro pri la pasinteco de Esperanto en Afriko montras, ke Esperanto floris ĉefe en tiuj lokoj, kie estis eŭropaj esperantistoj. Kiam tiuj ĉi forlasis Afrikon, la malprofundaj lokaj oazoj rapide sekiĝis. *Esperanto en perspektivo* (p. 503) mencias, ke la iama aktiva landa asocio en Maroko mortis pro la elmigro de la ĉefaj gvidantoj, kiuj estis francoj. Antaŭ 18 jaroj usona pastro raportis pri la instruado de Esperanto en Zanzibaro (*Esperanto*, majo 1960, p. 90) kaj esperis "ke la klubo ankaŭ post lia foriro de Zanzibaro daŭre funkcii". Pri la zanzibara grupo oni poste aŭdis eĉ ne unu

pepon! Nuntempe oni legas ofte pri "movadoj" en Madagaskaro kaj Zairo, sed mi havas la impreson, ke temas pri tro da fanfaronado, eĉ iom da blufado. Tra la jaroj la sola stabila enklavo de esperantistoj en Afriko estas tiu de Sud-Afriko, kies anoj estas eŭropdevenaj.

Rezulte de miaj spertoj kaj konversacioj pri Esperanto kun afrikaj kleruloj kaj universitatanoj, mi venis al la konkludo, ke afrikanoj lernos Esperanton, nur se ili povas antaŭvidi tujan kaj praktikan avantaĝon, ekzemple prestiĝan postenon aŭ stipendion por studi en ekster-afrika universitato. Nuntempe ne ekzistas iu ajn bona kialo, kiun oni povas uzi por konvinki afrikanojn, ke ili bezonas Esperanton. Sekve, kiu provas trudi la luksaron Esperanto en Afrikon nun, povas atendi certan fiaskon.

La plej efika maniero konvinki afrikanojn, ke valoras lerni Esperanton, estas unue "konverti" la eŭropanojn. Oni oficialigu la Internacian Lingvon en pluraj eŭropaj landoj kaj ankaŭ en gravaj internaciaj organizaĵoj. Poste Afriko tuj sekvos la bonan ekzemplon. La du leteroj de altrangaj poŝtaj funkciuloj el Zairo kaj Etiopio, kiuj aperis en *Heroldo de Esperanto* (1975, n-ro 1577, p.3) esprimas tiun sintenon.

Alia ebleco ekzistas por tiuj verdaj zelotoj, kiuj opinias, ke malgraŭ ĉio, oni devas tuj porti Esperanton al Afriko. Ili faru tion same kiel la misiistoj disvastigis la kristanan evangelion en Afriko. Ili iru tien kun la celo resti surloke 20, 30, eĉ 40 jarojn. Ili starigu lernejojn por instrui ne nur Esperanton, sed ankaŭ aliajn utilajn studobjektojn, por ke la afrikanoj ne sentu, ke ili perdas sian tempon ĝis la venko de Esperanto. Kaj ili akiru monrimedojn de tiuj samideanoj, kiuj same opinias, sed ne estas pretaj iri al Afriko.

Rilate la instruadon de Esperanto al afrikanoj, oni atentu tre gravan aferon: **oni ne faru tion per la eŭropaj eks-koloniaj lingvoj**. Ankaŭ G. Pirlot en sia klarvida letero al la redakcio (*Heroldo de Esperanto*, 1978, 1628, p.4) substrekis tiun ĉi punkton. La eldono fare de UEA-TEJO de informa broŝuro en la angla kaj franca lingvoj estas nepravigebla misfaro. La ĉi-supre menciita broŝuro de Tibor Sekelj estis pli bone verkita, sed ankaŭ ĝi estis eldonita en la samaj du lingvoj. La sama kritiko estas aplikebla al la eŭropaj Esperanto-lerniloj, kiujn oni proponas al afrikanoj. Kio okazis al la lernolibro por parolantoj de la ŝuahila lingvo, kiun d-ro István Szerdahelyi estis pretiganta, "adaptebla ankaŭ por la parolantoj de aliaj grandaj afrikaj lingvoj" (*Esperanto*, februaro 1975, p.38)?

La Estraro de UEA devus detale kaj profunde analizi ĉiujn proponojn por la disvastigo de Esperanto ekster Eŭropo por eviti malŝparon de tempo kaj mono. Mia opinio, ĉiu guldeno, kiun UEA aŭ TEJO investas en Afriko nuntempe, rapide malaperos kaj ne postlasos videblan spuron, ĉar la tempo ankoraŭ ne estas matura por nia afero tie. Restas ankoraŭ multo por fari en Eŭropo, kaj se sukceso estos atingita tie, pli facila estos la disvastigo de la Internacia Lingvo en ĉiuj aliaj regionoj de la mondo.

Bernard Golden

Prefikso mal- en la matematika terminologio

EN LA LASTA, duobla numero de *Matematiko translimen*, revuo de Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IADEM)* aperis interalie artikolo pri la prefikso **mal-** en matematika terminologio. Ĉar tiu artikolo povus kapti la atenton ne nur de matematikistoj, sed ankaŭ de ĉiuj, kiuj iel interesiĝas pri la faka terminologio, oni petis min publikigi tiun tekston ankaŭ en la revuo *Esperanto*.

La artikolo estas resumo de vigla diskuto, kiu, ekde 1976, okazas inter kelkaj membroj de IADEM pri la uzado de la prefikso **mal-** en matematikaj terminoj, interalie en **malegalaĵo** kaj **malaperto**. La vorton **malegalaĵo** mi uzas kiel tradukon de: angle *inequality*, france *inégalité* kaj germane *Ungleichung*, do por signi: $A < B$ aŭ $A \leq B$ (aŭ $A > B$ aŭ $A \geq B$), kaj la vorto **malaperta** estas topologia vorto, signanta la komplementon de **aperta** (angle *closed*, germane *abgeschlossen*, kaj france *fermé*).

La unua kialo, pro kiu oni kritikis tiujn du terminojn estas, ke la prefikso **mal-** tiel uzata havus signifon sufiĉe malproksiman de sia komunlingva signifo. Konsentite. Tamen, tiun kritikon oni ne direktu nur al la prefikso **mal-**, sed al preskaŭ ĉiuj matematikaj terminoj. Se ni parolas pri **ringo**, **grupo**, **baro**, **vico** ktp., ni uzas komunlingvajn radikojn kun novaj signifoj. Kial tio, kio eblas por normalaj radikoj, ne eblas por prefiksoj aŭ sufiksoj? Ekzemple, Thomas Pendlebury (Britio) rimarkigis, ke ne la **dividanto** faras **dividadon**, ĉar nur matematikisto aŭ kalkulilo povas plenumi tiun agon; nombroj estas nur pasiva materialo **per** kiu oni agas. Tamen, la sufikso **-ant** estas uzinda en la termino **dividanto**, eĉ laŭ *PIV*, do kun signifo sufiĉe malproksima al ties komunlingva signifo. Kial ni ne agu same koncerne la prefikson **mal-**?


Tamen, kelkaj partoprenantoj en la diskuto restas ĝenataj de la fakto, ke en la malegalaĵo $A \leq B$, A kaj B rajtas esti egalaj, same kiel malaperto rajtas samtempe esti aperto. Tio ne ŝajnas al mi tro kontraŭdira: ankaŭ homo rajtas esti mense juna kaj korpe maljuna aŭ inverse. Homo estas granda kompare kun insekto kaj malgranda kompare kun elefanto; grandeco estas kaj avantaĝo kaj malavantaĝo, depende de la cirkonstancoj; tio, kion mi diras, estas iusence vera, alisence malvera. Do por ke iu afero estu tia aŭ maltia, ne nur gravas tiu afero mem, sed ankaŭ la vid-

punkto, laŭ kiu ni konsideras ĝin. Se ni asertas, ke iu spaco estas malaperta, ni intencas uzi por ĝi la proprecojn de malapertaj spacoj, do ni konsideras ĝin el preciza vidpunkto. Ĝi ja rajtas esti ankaŭ aperta, sed tio ne gravas por ni, krom se ni eksplicite aldonas tiun informon. Por montri, ke ne-malplena subspaco de koneksa spaco identas la plenan spacon, sufiĉas montri, ke ĝi estas kaj aperta kaj malaperta. Sed temas pri du sendependaj demonstradoj, ĉar necesas konsideri la saman spacon el du tute malsamaj vidpunktoj. Se ni skribas: $1 + 1 \leq 2$, tiu malegalaĵo estas plene prava, kaj havas signifon alian ol la egalaĵo: $1 + 1 = 2$, ĉar en la malegalaĵo ne gravas la valoro de $(1 + 1)$, gravas nur, ke tiu valoro ne estas pli granda ol 2. Kompreneble estas malkonsilinde paroli pri **malegalaj nombroj**, sed tiun esprimon oni fakte ne bezonas, nombroj estas ĉu egalaj, ĉu ne-egalaj; oni parolu pri **malsamaj nombroj**, sed ne **malegalaj**. Cetere, tian adjektivon **malegala** oni ne uzas (nek bezonas) en la franca lingvo.

La vorton **malegalaĵo** mi kopiis el kelkaj lingvoj (i.a. angla, franca, germana), kie tiu termino ne estas la plej logika ero de tiuj nacilingvaj terminologioj. Krome, la prefiksoj *in-*, *un-*, en tiuj ĉi lingvoj povas signifi aŭ **ne-**, aŭ **mal-**, aŭ eventuale **mis-**, **dis-** k.s. Kial do elekti **mal-**? Raoul Bricard (1905), Cyrillo Vörös (1911), Maurice Fréchet (1952), Aŝvinikumar (1966), Władysław Klimek (1976),... uzis la terminon **neegalaĵo**. Ankaŭ Olav Reiersøl (Norvegio) uzis tiun ĉi terminon ĝis 1976, kiam li konvinkiĝis, ke **neegalaĵo** laŭlogike signifas: $A \neq B$. Sed li nun opinias, ke malegalaĵo estu: $A \ll B$ (simbolo uzata ĉefe de fizikistoj). Rudolf Fischer (FR Germanio) male opiniis, ke $A \neq B$ estu malegalaĵo, dum ne-egalaĵo estu iom taŭga, ne plej plaĉa termino por: $A < B$. Fakte, laŭ mi, neegalaĵo estas aserto, ke du nombroj ne estas egalaj, **ĝi ne rajtas esti io pli ol tio**; estas ja pli facile modifi la signifon de la prefikso **mal-** en la matematika terminologio ol modifi la signifon de la negacio **ne**!

Yashovardhan (Hinda Unio) opinias, ke la prefikson **mal-** oni uzu nur, kiam temas pri du ekstrecoj inter kiuj ekzistas amaso da mezaj punktoj. Gerard Cool (Svislando) rimarkigas, ke la prefikson **mal-** oni jam

* Tiu duobla numero de *Matematiko translimen* estas aĉetebla ĉe la Libro servo de UEA; prezo: 6,90 (Ned. 7,18) gld.



Anstataŭ **malegalaĵo**, Rudolf Fischer proponas **komparaĵo** kaj Olav Reiersøl proponas **pliaĵo** por $>$, kaj **plialaĵo** por $\geq$. Pri la propono de Olav Reiersøl mi ne konsentas, unue, ĉar ĝi ne solvas la problemon pri **malekvacio** (ekzistas sama diferenco inter **egalaĵo** kaj **ekvacio** kiel inter **malegalaĵo** kaj **malekvacio**), due, ĉar ĝi donas direkton al la malegalaĵo: $A > B$ kaj $B < A$ estas ekzakte la sama malegalaĵo, sed mi ne ŝatus uzi la vorton pliaĵo por $B < A$, nek uzi malsamajn

REDAKCIA NOTO: Gratulon, se vi sukcesis finlegi la ĉi-supran tekston ne estante matematikisto. Ni devas konfesi, ke la publikigpeto, kiun la aŭtoro mencias en la unua alineo, ne estis ideo redakcia. Ankaŭ ni trovas ĉi tiun tekston malfacila kaj eble eĉ neinteresa por la granda plimulto de niaj legantoj. Ni publikigis ĝin, ĉar estis iom malfacile ĝin rifuzi. Krome, estas ja bone konstati, ke jen ankaŭ en Esperanto aperas tekstoj nekompreneblaj pro troa fakeco. Tio estas bona signo, ke la faka lingvo evoluas kaj do komplikiĝas.

Elstara verko pri Zamenhof

Recenzas Marjorie Boulton (Britio):

La kaŝita vivo de Zamenhof de N.Z. Maimon. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1978. 214p. 21cm. Bind.

Tiu ĉi valora libro, bele kaj inde prezentita kaj vere zorge presita, suplementas, kaj parte korektas, ĉiujn ĝisnunajn biografiojn pri Zamenhof. Ĝi ne estas memstara biografio, sed aro da studaĵoj pri kelkaj aspektoj de la zamenhofaj vivo kaj medio, pri kiuj N.Z. Maimon kolektis informojn plejparte novajn.

Neniu nova informo servas la malnoblan apetiton, elserĉi ion malestimindan ĉe eĉ plej merite renomaj personoj. Ŝajnas ankoraŭ, ke ju pli oni elfosas detalojn pri la dediĉita, altruisma vivo de Zamenhof, des pli brile lumas liaj kuraĝo, persisto kaj inteligenta homamo, antaŭ malhela fono.

La ĉefa esplordirekto de Maimon estis pri la fono kaj pensado de Zamenhof kiel judo. Aparte valoraj kaj novaj estas studaĵoj pri juda klerismo en tiu epoko; pri la seriozaj jidlingvaj studoj kaj eĉ poemoj de Zamenhof; pri liaj aliaj laboroj, sindediĉaj kaj ne ĉiam senriskaj, ĝuste kiel judo, precipe rilataj al frua cionismo; kaj traduko de longa, interesa intervjuo kun Zamenhof el *Jewish Chronicle* (Anglujo) el 1907. La libro pri-traktas ankaŭ la urban kaj hejman medion de Zamenhof juna; la devenon de liaj nomoj kaj multaj pseŭdonimoj; detalojn pri tiuepokaj cenzuraj problemoj kaj la tiurilatan katastrofon en la vivo de Marko Zamenhof; novajn detalojn kaj hipotezojn pri la geedziĝo; kaj detalojn pri hilelismo. Aldonaj estas portreto kaj mapoj de tiuj partoj de Bjalistoko kaj Varsovio, kie iam loĝis Zamenhof.

Ĉio estas tre kompetente klarigita en bona Esperanto, laŭ stilo erudiciema, kvankam foje tuŝita ankaŭ per la flamo de kompato kaj indigno pri suferoj de ege suferinta gento; abundas konsciencaj piednotoj, kiuj dokumentas la fontojn de la nova materialo; tiel ke ĝenerale la verko estas modelo de sia speco. Certe, ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la vivo de Zamenhof, kaj tiuj ideologiaj influoj, kiuj naskis Esperanton kaj la altruisman zamenhofan esperantismon, nepre legu tiun ĉi studaĵaron.

Verko, verkita kun tiom da sindediĉo pri temoj tiel ideologie signifoplenaj, apenaŭ povas eviti ialokan tendencon. Kelkloke, raciaj, dokumentitaj argumentoj pri probablecoj iĝas asertoj iom tro certaj. Sur p. 207 Maimon avertas, kiel Privat, ellasante parton de letero, iom falsigas la sintenon de Zamenhof: prava averto; sed sur pp. 181-2 Maimon, ellasante duonon de ŝlosila

diraĵo de Jesuo, falsigas komparon de Jesuo kun Hilelo. Kaj ĉu necesis la ĉiam iom malestima tono pri ĉiaj aliaj Zamenhof-biografioj? Ĉiu homa laboro estas neperfekta, sed ofte malgrandaj atingoj, ne senpenaj, devas antaŭi pli grandajn.

Sed tiu, kiu iam verkos la definitivan biografion de Zamenhof, nepre ŝuldos multon al N.Z. Maimon kaj liaj helpantoj.

Mendu ĉe UEA: 25,50 (por Nederlando 26,52) gld., plus sendokostoj 10%.

Gracia simpla

Recenzas Clelia Conterno (Italio):

El la vivo de Vesna Skaljer-Race. Beograd: la aŭtoro, 1977. 67p. 17cm.

Ne atendu el tiu ĉi volumeto pli ol tion, kion promesas la titolo: "El la vivo", do erojn de la eterne preterfluanta vivo. Aŭ ili ridetas, glime brilas en moka finalo (poezia nokta lumeto flagranta, kiu montriĝas esti nur lumo de necesejo; svelta virina silueto, kiu apartenas al maljunulino; granda nazo de ĉikanema pikita juĝisto); aŭ ili seriozas, kelkfoje atingante dramajn ecojn (virino kiu naskas inan bebon ĉe la rando de kampo kie atendis ŝin kaj aliajn ostaĝojn la pafiloj de murdistoj); aŭ ili estas nur reflektadoj de meditadoj kies esencon oni devas diveni el la surpaperigitaj rezultoj.

Kelkaj el la eroj estas trafaj, kelkaj estas malfortaj; sed la leginto ne povas depreni sin de ia allogo: kvazaŭ restus al ĝi en la manoj, post la legado, ja nenio: sed gracia, ĉarma, kortuŝa nenio.

Mendu ĉe UEA: 8,10 (por Nederlando 8,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Poeto pri poeto

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Malmalice de Johán Valano (pseŭd.). Pisa/Kuopio: La Nuova Frontiera/Librofako de *Literatura foiro*, 1977. 59p. 21cm.

Johán Valano, jam bone konata pro sia debuta prozverko *Ĉu vi kuiras ĉine?*, nun prezentas al la esperantistoj sian poetan talenton per malgranda poemaro. Liaj fruaj versaĵoj, komencantaj la kolekton, atestas jam pri subtila sento pri ritmo kaj rimo, kiu en la postaj poemoj disvolviĝas en pli exploreman konscion pri la senco kiel elirpunkto. Estas ja interese rimarki, kiel la kuntena formo de la junaĝe verkitaj poemoj transformiĝas en malpli avaran esprimmanieron en la

postaj. Okaze, la adoleska poeto admirinde sukcesas je malfacilaj temoj kiel detruo, kompato, malespero, parte pro propra sperto, parte pro firma formstrukturo, kies stilefiko pere de rimoj kaj ripetoj atingas la aŭtentikon de konvinko sen subfosa sentimentalito:

Sub mortiga bomba kraĉo
vivoj iĝis torda kaĉo
preta por la morda maĉo
de malsata hund'.
El la vento kiu muĝis,
el la venko kiu ruĝis,
el la venĝo, kien fuĝis
vi kun via vund'?

(Premsonĝo)

Grandan parton de la poemaro karakterizas tamen pli libera formo, ofte sen finrimoj kaj ĝenerale sen regulaj verslongoj. Malgraŭ tia forlaso de konvenciaj regulaĵoj konscia artismo daŭre sin evidencigas per aliaj rimedoj: aliteracio, asonanco, ekvilibro, ripeto. Tio pruvas, ke Valano esence estas vorta artisto, kiu daŭre revenas al la demando de formo, tamen, mi esperas, sen inklino al imitado, sed kun provemo kaj exploremo. Sed li estas ankaŭ pensemulo kaj havas multon gravan por diri, kion li ne nur donas senhezite el sia propra animo, memesplore, analize, sin-takse — probable pli malavare kaj



Johán Valano: Lia unua poezia volumo alportas plurajn poemojn de antologia kvalito.

elfareme ol estas kutime ĉe niaj poetoj — sed ankaŭ pritraktante eksterajn temojn, se ne tre originale, tamen ambicie kaj plenspire. Henri Vatré, en siaj antaŭvortoj, epitetas iujn el la poemoj whitman-aj, t.e. laŭ la maniero de Walt Whitman. En tio li pravas, poemo kiel **Solena saluto** almenaŭ supraĵe tuj memorigas pri la stilo de la granda usona poeto:

Mi salutas vin, ho celo de la homoj!
Rigardu nin kuri barakte
kiel ratoj en tro malvasta spaco
tra miraĝa marĉo alloga
jen laŭ tiu vojo, jen laŭ tiu ĉi,
obstine obtuze obsede
fascinate
al vi...

Komence la temo ŝajnas tro abstrakta por doni esperon pri kontrolita, poezia pritrakto. Tamen Valano sukcesas konkretigi ĝin per bildo post bildo, kiuj per sia organika katalogeco produktas efikon amasiĝan, vastan ĝeneralan panoramon konsistantan el realaj detaloj,

gvidataj de klara vizio. Sendube tiu odo kaj alia, **Senpoveco**, apartenas al la pintaj poemoj de nia literaturo, teme kaj konstrue. Kun emocio kaj renovigita optimismo pri la evoluo de nia poezio mi salutas la poeton de tiuj ĉi tre rimarkindaj verkoj.

Evidentaj preseraroj: p. 14, str. 7: **lulkanto**, legu **lulanto**; p.44, str. 2: **ni povas vin kapti**, legu **ni provas vin kapti**; p.54, str. 1: **tre**, legu **tro**.

Mendu ĉe UEA: 10,80 (por Nederlando 11,02) gld., plus sendokostoj 10%.

Scienca pritrakto

Recenzas Peter G. Forster (Malavio):

Internacia lingvistika simpozio, Kumrovec 1975. Diversaj aŭtoroj. Redaktis Z. Tišljár. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1976. 256p. 21cm.

La verko celas pritrakti la temon "Esperanto kiel lingvistika bazo de universala gramatiko kaj de metalingvo kaj kiel universala lingva fenomeno". Tiu celo estas sufiĉe vasta, sed la diversaj referaĵoj sukcesas tuŝi multajn aspektojn de la ĝenerala temo de la verko. La libro estas utila ekzemplo de faka pritrakto de fakaj demandoj pri Esperanto. Kelkaj referaĵoj estas tradukitaj el la serbokroata, dum aliaj prezentiĝis rekte en Esperanto. Tio estas interesa kunlaboro de la fakuloj interne kaj ekstere de la Movado.

En la provoj aranĝi fakajn renkontiĝojn kiel ĉi tiu, kiun koncernas la jena libro, ĉiam estas problemoj, ke la esperantistoj volas defendi sin de multaj kritikaj fare de neinformitaj lingvistoj. Tiurilate ĉi tiu libro estas sukcesa ekzemplo kiel uzi la ilojn de la nuntempaj lingvaj teorioj por scienca pritrakto de Esperanto.

La stilo de la verko estas ĝenerale bona, kvankam estas ĝena diversloka misuzo de la vorto "standarda". La grafika prizorgo de la libro ne meritas multajn komplimentojn.

Mendu ĉe UEA: Bindita 33,90; broŝurita 29,70 (por Nederlando 35,26 respektive 30,89) gld., plus sendokostoj 10%.

Kiam venos daŭrigo?

Recenzas G. F. Makkink (Nederlando):

Nocioj pri ornitologio de W.M.A. de Smet. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 83p. Ilus. 30cm.

Por limigita somerkurso docento devas elekti materialon. Pro tio la belga ornitologo nomis sian kurson: nocioj. En la unua ĉapitro temas pri terminoj, en la dua pri birdonomoj (komunlingvaj kaj sciencaj), en la tria pri la plej karakterizaj ecoj de la birdoj, en la kvara pri la sistematiko (pri ĉiuj ordoj kaj multaj familioj), dum la kvina ĉapitro traktas pri la troviĝo sur la terglobo kaj pri migrado. La klarigoj estas simplaj kaj

koncizaj kaj la ilustraĵoj plejparte bonaj. Du paĝoj da fakterminoj finas la kajeron. Nur Esperanta literaturo, plejparte popularscienca estas menciita. Tio impresas iom ŝovinisme; bedaŭrinde sciencaj man- kaj stud-libroj en la grandaj lingvoj ne estas menciitaj. Neniu pli bone ol la aŭtoro mem scias kiom da aliaj ĉapitroj povus esti aldonitaj; espereble iam sekvos daŭriga kurso. SUK-kajeroj estu multe aĉetataj de la esperantistaro; ili prezentas valoran materialon por studi per Esperanto kaj samtempe estas fruktoj de necesa pludisvolvo de la scienca lingvo en Esperanto.

Mendu ĉe UEA: 17,40 (por Nederlando 18,10) gld., plus sendokostoj 10%.

J. H. Rosbach duoble

Recenzas Francisko Simonnet (Francio):

Verda robo aŭ Ordinaraĵ indianoj de J.H. Rosbach. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1974. 93p. 21cm. ISBN 87 85020 729.

En *Verda robo*, intence malbrila kaj mallerteca preskaŭa romano, pli ol la nekredeblaj krimaferoj kaj ol la neegalspritaĵoj epizodoj, kiujn ili iel ligas, gravas iuj eroj en la kondutoj de la personoj, kaj precipe la pripensoj de sinjoro Rosbach kaj aliaj gastoj de ripozhotelo pri tiuj epizodoj kaj kondutoj, pri la pejzaĝo kaj pri diversaj temoj: amo, arto, maljuneco, lunvojaĝoj... La ne-urĝa leganto pripensemas plue kaj ekŝatas la interparolantojn. Ĉe unua lego mi trovis, ke delikata arto sin kaŝas tie; ĉe dua relego mi tiun arton jam ne retrovis. Kiuforte mi mislegis?

Kun mirego, pro la bona famo de J.H. Rosbach kaj pro la kontrolo de lingva komitato, mi konstatis multajn fuŝaĵojn, etajn, sed apenaŭ aŭ nepre ne tolereblajn: en interpunkciado (oftege pri la interpunkcia streko), en elekto de vorteroj (**aprec, ekscentr, ekskuz, esk, event, fragil, maskl, old, pigr** kaj pli ol dudek aliaj neesperantaĵoj) aŭ en ties uzo (**nun** anstataŭ **tiam, sekundono...**), en frazfaro (**mi trovis iom komika, ke tiu maljunulo interesiĝu pri knabinoj miaaĝaj; oni diris pro nesingardo** anstataŭ **oni diris, ke pro nesingardo; ne kun nek;** p. 24: **ĝia** anstataŭ **sia...**), eĉ ĝis plena malklareco (**kvankam ĉio indulgoj...**), kaj tiel plu. Gajigas **baska ĉapelo** anstataŭ **vaska ĉapo**.

Se mi disponus unu plian paĝon, mi povus sufiĉe plilongigi ĉi tiujn listojn, kaj aldoni, ke la libro **cetere** estas konsilebla al progresantaj lernantoj: relative facile legebla kaj kun imitindaj aŭ diskutindaj modeloj por stilekzercoj. El la ĝuemaj legantoj, iuj ĝin ŝatos, kiuj kapablos malatenti la ĉi-supre priparolitajn hontindaĵojn, kaj kiuj trankvile kaj pacience ĝin legos.

Sajgono, dum la vintro 1975 *

* La teksto pri *Verda robo* estis sendita al ni komence de 1975 el Sajgono (nuna Ho-Chi-Minh-Urbo), kie la recenzanto tiutempe lekciis en la Universitato. Tamen, tiu sendaĵo neniam sukcesis atingi la revuan adreson, kio kaŭzis la grandan malfruigon de la recenzo.

Fianĉo de l'sorto de J.H. Rosbach. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 192p. 21cm. ISBN 87 85020 974.

Fianĉo de l'sorto estas pli vere romano, kaj multmaniere pli grandambicia verko.

La ĉefajn personojn oni akompanas de ilia infaneco, tra junuleco, ĝis renkonto kun morto, mallibero kaj malfeliĉo. Ilin kaj eĉ la ceterajn, malpli plene ekzistantajn, oni scivoleme deziras pli bone koni. La rakonto mem por multaj legantoj estos, kiel por William Auld, "tiel streĉe atentokapta," ke ili volos "finlegi ĝin eĉ antaŭ ol ellitiĝi".

La temoj estas gravaj: pri peko kaj puno, pri libero kaj justo, pri la morto kaj ties pikilo. Kaj ili lerte estas interplektitaj kun la propra spertoriĉiĝo kaj kun la amaj aferoj de la personoj en la rakonto, kaj ankaŭ kun la historio de Norvegujo, ne de Norvegujo sola.

Spite al tio, ĉi tiu libro multrilate similas al *Verda robo*. Ankaŭ en ĝi gravas la kondutmanieroj kaj la komentarioj pli ol la okazaĵoj mem. Ankaŭ en ĝi la stilo estas klara kaj intence malgrandioza (pro kio oni pli volonte eltenas la mallertaĵojn, pri kies voliteco mi tamen jam dubas), same kiel la homoj (krom kelkaj malbonuloj) estas trankvilaj kaj retenigemaj, eĉ dum ili agas plej nekutime. Al la senrilateco de la temoj kaj de la epizodoj, en ĝi respondas la diserigiteco de la teksto: la meza, ĉefa parto konsistas el pli-ol-cent-era taglibro de junulo; la tria, lasta, el XXVIII ege mallongaj ĉapitroj. En ĝi eĉ pli gravas iu strangaĵo en amrilatoj (tamen ne la sama), per kiu la aŭtoro intencas ne nur iom spici, sed esti profunde originala.

Al multaj forte malplaĉos, ke plenaĝa viro tiel publikigas siajn priamajajn revojn kaj faras el ili la centran aferon en siaj rakontoj. Amantoj de seksaj pipraĵoj tamen ne antaŭfrandu: ĉio estas dirita simple kaj iel digne; tie la "voluptaj pensoj" estas "gravaj pensoj" (p. 103).

Multo en la libro, almenaŭ en la unua parto, pri infaneco, estas vere admirinda, ĉefe pro la penetra simpatio, laŭ kiu la verkinto ĉion sentas kaj vidas per koro kaj okuloj de siaj personoj. Tiel kaj alie, J.H. Rosbach edukas sian leganton al respektemo kaj komprenemo kontraŭ aliaj homoj.

Longe mi dezirus skribi plu: ĉar estas en la libro subtilaj pristudindaĵoj, kaj ĉar ĝi pripensigas; sed ankaŭ ĉar valorus provi pli precize difini, kial ĝi kvazaŭlame postlasas impreson de iel neatingita majstreco. Al tio grave, sed nur parte kontribuas la konsternaj lingvaj aĉaĵoj, kiujn, same kiel por *Verda robo*, mi devus listigi.

Leginde (tamen de malfortuloj seksaj aŭ lingvaj — alivorte: de tre junaj homoj aŭ de Esperanto-lernantoj — nur kun gvidanto). Esperige: valorus, ke sinjoro J.H. Rosbach plu verkadu. Certe ne premieble.

Ĉe Marsejlo, marto 1978

Mendu ĉe UEA: *Verda robo* 13,20; *Fianĉo de l'sorto* 17,40 (por Nederlando 13,73 kaj 18,10) gld., plus sendokostoj 10%.


En pli granda mondo (1947?), Francisco Cândido Xavier (1910-) El la portugala trad. Carlos de Almeida Wutke. Rio: Federação Espírita Brasileira, 1977. 215p. 18cm. Rakonto pri la transtomba vivo, "diktita de la spirito André Luiz". Prezo: 15,00 gld.

Esperanto als internationale Hilfssprache; Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes angenommen von der dritten Vollversammlung des Völkerbundes (1923). Nürnberg: Ludwig Pickel, 1977 (fotorepreso). 48p. 21cm. Historische Dokumente 1. Germana traduko de la raporto de la Ligo de Nacioj pri Esperanto. Prezo: 6,30 gld.

Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj; Esperanto aŭ Interlingua?, Edo Bernasconi (1940-). La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1977. 4 + 164p. Mimeo. 30 cm. Studoj 9. Komparo inter Esperanto kaj la IALA-projekto Interlingua el filozofia, tipologia, historia kaj psikologia vidpunktoj, kun konkludo favora al Esperanto. Prezo: 27,90 gld.

Zamenhof: Halina dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof. Oosaka: Ĵuntaro Iŭaŝita, 1977. 230+22p. 24cm. Fotorepreso de la ruslingvaj originaloj kaj Esperantaj tradukoj, kun komentario de Naokazu Kawasaki. Temas pri la dokumentoj, kiujn en 1934 Halina Edelbaum sendis el Varsovio al Tokio. Prezo: 45,60 gld.

Historieto de la japana Esperanto-movado (1968), M. Miyamoto (1913-). Oosaka: KLEG, 1977 (3a reviziita eldono). 130p. 19cm. Konkiza, sed tre klara kaj faktoriĉa superrigardo, de la "mitologia epoko" antaŭ la starigo de organizita movado en 1906 ĝis la nuntempo. Kun indekso kompilita de Jürgen Hamann. Prezo: 10,20 gld.



Dum preskaŭ duonjarcento, la originala poezio de Kalocsay reprezentigis esence nur per *Streĉita kordo*. Nun, fine, *Izolo* prenas sian lokon apud ĝi. La unua eldono de *Izolo* fariĝis praktike kvinekzemplera, pro la militeksplodo en 1939. Ĉi tiu fotorepreso estas farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj.

Eldonis UEA, Rotterdam, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Ned. 17,16) gld. + afranko 10%.

Kapti vulturon viva, Huang Geng. Adaptita de Hiaŭ Jen. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 59p. Kolorilus. de Gan Vujan. 25cm. 88-Es-143P. Du mjaŭ-naciecaj knaboj protektas la komunuman anasbredejon kontraŭ predanta birdo. Prezo: 1,20 gld.

Zamenhof: La kaŝita vivo de Zamenhof; Originalaj studoj, N.Z. Maimon (1905-). Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1978. 214p. plus du mapoj. 21cm. Bindita. Esearo de unu el la plej kompetentaj zamenhofologoj. Enkonduko de G. Waringhien. Prezo: 25,50 gld.

Lingvaj anguloj, F. Baronnet (1888-). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978). 79p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 129A. Kolekto de mallongaj lingvaj rubrikoj aperintaj unue en *SAT-Amikaro* kaj *Esperanto-lernejo*. Prezo: 3,30 gld.

Malŝlosilo finna. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1977. 32p. 15cm. ISBN 951-9005-39-0. Prezo: 2,10 gld.

Optimala ortografio de la internacia lingvo Esperanto, Albert Lienhardt. Mulhouse: O.E.O., 1978. 122p. 21cm. Ofsete reduktita manuskripto. Proponas solvon de la "problemo pri la ĉapelitaj konsonantoj" kaj pri la literoj q, w, x, y, mankantaj en la Esperanto-alfabeto. Prezo: 9,00 gld.

Oriento vokas; Esperanto-kolumno en la korea jurnalo Dong-A Ilbo. Yokohama: Jokohama Esperanto-Rondo, 1977. 96p. Ilus. Mimeo. 24,5cm. Dokumentaro pri la Historio de l'Esperanto-Movado en Koreio n-ro 2. Kolekto de ĵurnalartikoloj el la jaro 1924, kun aldonaj materialoj pri la korea pioniro Verda E. Kim kaj pri la nuntempa movado en Suda Koreo. Prezo: 7,50 gld.

Parler l'espéranto, Renée Volpelière (1917-). Nîmes: la aŭtoro, 1976 (3a eld.). 65p. 21cm. Prezo: 8,70 gld.

Practical course in Esperanto, A (1937), Ferenc Szilágyi (1895-1967). Al angla lingvo adaptis Fred Wadham. Orelia: The Esperanto Publishing Company, 1977 (represo de la 12a eld.). 99p. Ilus. 18cm. ISBN 0 85230 011 5. Populara, amuza lernolibro sen malfacilaj klarigoj gramatikaj. Prezo: 3,00 gld.

Santos Vega (1885), Rafael Obligado (1851-1920). El la hispana tradukis Horacio Ré. Diamante: Argentina Esperanto Muzik-Eldonejo, 1977. 49p. Ilus. de la tradukinto. 16cm. La dua plej grava poemo gaŭĉeska, post *Martin Fierro*. Antaŭparolo, glosaro kaj revizio de Ergoto de Bonaero. Prezo: 3,60 gld.

Trezorinsulo (1882), Robert Louis Stevenson (1850-1894). El la angla tradukis Grace Kirkwood. Glasgow: Kardo, 1977. 6+181p. Ilus. 21cm. ISBN 0 905149 05 X. Aventurromano pri pirato kaj junulo, kiu aliĝas al lia serĉo por enterigita trezoro. Prezo: 14,10 gld.

Soife mortas mi; Kvar baladoj, François Villon (1431-1464?). El la franca tradukis François Gauthier. Lelystad: Vulpo, 1977. 15p. Ilus. 15cm. ISBN 90 70074 05 2. Verkoj de la granda pariza poeto-fripono: "Balado de kontraŭdiroj", "Balado de bona instruo", "Debato inter korpo kaj koro", "Balado de etaj diraĵoj". Prezo: 1,80 gld.

Spurado, Lin Hongju. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 40p. Pentraĵoj de Cuj Ĵuguo kaj Gaŭ Baŭŝeng. 21cm. 88-Es-136P. Juna mongolo lerte kaj brave helpas kapti kamelŝtelinton. Prezo: 0,90 gld.

Unua kajero de Esperanto por elementaj lernejoj / Primo quaderno di Esperanto per le scuole elementari, Pietro Dao. Trento: la aŭtoro, 1975. 31p. Ilus. 24cm. Prezo: 2,70 gld.

Wir lernen Esperanto, Wilhelm kaj Hans Wingen. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund e.V., 1977 (fotorepreso de 8a eld., 1973). 2 + 76 + 32p. 20cm. Kun ŝlosilo al ĉiuj ekzercoj, kaj, sur aparta folio, kvarpaĝa vortareto. Prezo: 9,00 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,- gld.

34a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, 1978 07 22 – 29, Veliko Tarnovo
Adreso de LKK: P.k. 587, BG-1000 Sofia C.
Konstanta adreso: CO de UEA/TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.

Amikeco kiel temo kaj praktiko

EĈ SE OKAZUS en la 34a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Veliko Tarnovo neniuj laborsesioj kaj diskutrondoj, la ĉi-jara kongresa temo de IJK tamen estus amplekse traktita. La fenomeno de IJK estas en si mem praktika realigo de la temo elektita por Veliko Tarnovo: "Esperanto kaj interjunulara amikeco".

Kiam renkontiĝas centoj da gejunuloj, ne nur diversaciaj sed ankaŭ diverskontinentaj, estas neeble malhelpi, ke tia temo estu objekto aŭ fono de preskaŭ



Se juĝi laŭ la komforto de la kongresejoj, TEJO ĉiam pli kaj pli establiĝas: Iam oni kapablis kongresi en eksaj ĉevaloj kaj forlasitaj monaĥejoj, por en la lastaj jaroj insisti pri komforto. En Veliko Tarnovo IJK ĝuos lukson.

ĉiu konversacio kongresa. La temo tamen implicas pli ol simplan interkonatiĝon kaj agrablan restadon inter amikoj. Se oni celus nur tion, sufiĉus la vortumo "interjunula amikeco". La temo emfazas kolektivon – "interjunulara amikeco" –, pro kio oni do pensu ankaŭ pri rilato inter junularoj el diversaj mondpartoj, el mal-samaj socikulturaj fonoj, kun neidentaj mondperceptoj. Kiom ajn dum la lasta jardeko trudiĝas iaj komunaj trajtoj de la junularaj streboj kaj movadoj tra la mon-

do, la menciitaj diferencoj ankoraŭ ekzistas kaj ludas gravan, esencan rolon.

Krome, la kongresa temo ne enfokusigas la esperantistan junularan amikecon, sed provas kunfrontigi la Internacian Lingvon kaj la junularan amikecon. Oni do pensu ankaŭ pri la junularaj rilatoj ekster la Esperantomovado, kaj ĉefe: oni studu la rolon, kiun Esperanto povus ludi en tiuj rilatoj.

Amikeco, kiu entenas ankaŭ reciprokan komprenon kaj agnoskon de alispecaj vidpunktoj, estas io pene atingebla, sed des pli valora kiam atingita. Veliko Tarnovo donas al ni ŝancon sperti en la kongresaj laborarangoj veran dialogon inter la Oriento kaj Okcidento, kio en multaj ĝisnunaj kongresoj apenaŭ eblis pro emfaze unuflanka partoprenantaro. Ĉar aliĝis pluraj ekstereŭropanoj, ni eble havas iom da ŝancoj sperti ankaŭ dialogon inter la Sudo kaj Nordo, nocioj pli modernaj kaj pli aktualaj en la hodiaŭa mondo.

Kompreneble, la 34a IJK havos ankaŭ amason da aliaj temoj, ĉar LKK antaŭvidas tre riĉan kaj varian programon, kiu inkluzivas ankaŭ jenajn erojn: interkona, internacia, teatra kaj bulgara vesperoj, pupteatra prezento de *La eta princo* de Saint-Exupéry, proklamo de la "Verko de la jaro" (konkurso de *Literatura foiro*), vizito al junulara labortendaro, sporta konkuro, diskoklubo, ekskursoj ktp.

"Veliko" en la nomo de la kongresa urbo signifas "granda". Laŭ pluraj indicoj, TEJO efektive havos grandan kongreson en Veliko Tarnovo. Tial ne prokrastu aliĝi kaj pensu pri la fakto, ke la kotizoj (vidu nian martan numeron, p.59) signife altiĝos post la fino de majo. LKK nun preparas la Duan Bultenon de IJK, kiun oni dissendos al ĉiuj aliĝintoj kaj landaj sekcioj. Tie vi trovos ĉiujn ceterajn detalojn pri la 34a IJK, kiujn ni ne sukcesis mencii ĉi tie.

S. MacGill

Studentaj grupoj

La 31an de marto kaj la 1an de aprilo 1978 reprezentantoj de germanaj universitataj Esperanto-grupoj kunsidis en la Teknika Universitato de Berlino. La konferencanoj pritraktis la evoluon en la universitataj grupoj post la kunveno en Münster/Vestfalio pasintan septembron, problemojn de Esperanto-varbado en la universitato, lingvajn barojn dum internaciaj sciencaj konferencoj, preparon de fakterminoj, kontaktojn de ĝemeliĝintaj universitatoj kaj kunlaboron kun eksterlandaj universitataj Esperanto-grupoj.

Yashovardhan, hinda matematikisto, transprenis la taskon kunordigi la agadon de la Ligo de Germanaj Universitataj Esperanto-Grupoj. Lia adreso estas Rheinallee 37, D-5300 Bonn 2, FR Germanio. Tien ankaŭ eksterlandaj universitataj rondoj bonvolu sendi informojn pri siaj organizo kaj programoj. La 3a konferenco okazos de la 13a ĝis la 15a de oktobro ĉi-jare en Darmstadt.

O.G.



63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Varno (Bulgario) 1978 07 29 – 08 05

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Bul.
Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.

Bulgara vizo: Pro la ekzisto de senvizaj rilatoj, ne bezonas bulgaran vizon kongresanoj el ĉi tiuj landoj: Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Germana DR, Hinda Unio, Hungario, Islando, Jugoslavio, Mongolio, Norvegio, Pollando, Portugalio, Rumanio, San Marino, Soveta Unio, Svedio kaj Tunizio. Ŝtatanoj de ĉiuj aliaj landoj petu la vizon ĉe la plej proksima bulgara ambasado. Atentu, ke tio tamen ne estu unu el la supremenciitaj landoj, ĉar la ambasadoj tie ofte ne havas vizan fakon. Ĉio ĉi validas ankaŭ por la landoj kun kiuj Bulgario ne havas diplomatajn rilatojn (ekz. Israelo, Korea Respubliko kaj kelkaj aliaj). Ne necesas aparta invitletero por ricevi la vizon. Tiuĉele sufiĉas la kongreskonfirmilo – la poŝtkarto, kiu sciigas la aliĝinton pri la kongresa numero. Ĉiuj bulgaraj ambasadoj ricevis apartan instrukcion de sia registaro pri la vizoj por la partoprenantoj de la 63a UK en Varno.

Vizo por Rumanio: Aliĝintoj al la tuttaga ekskurso B4, al Konstanca kaj Mamaja, Rumanio, bonvolu noti, ke necesas akiri anticipe rumanan vizon. Vizo ne necesas por la postkongresa ekskurso C2 al Istanbul.

Abunda ISU-programo: Internacia Somera Universitato ĉi-jare ofertas dek du prelegojn, kun prelegantoj el naŭ landoj: V. Benczik (Hungario), "Teoriaj prob-

lemoj de la Esperanta literaturo"; A. Boia (Rumanio), "La baza vortprovizo kaj la vortstatistikaj esploroj en Esperanto"; V. Ĉoĉov (Bulgario), "Utiligado de la libera tempo: socialaj kaj psikologiaj aspektoj"; L. Göttler Kárpáti (Hungario), "Komputilaj retoj kaj la lingvo-problemo"; S. Kawamura (Japanio), "Plantaj fibroj kiel komponaĵoj de manĝaĵoj"; S. Krajnov (Soveta Unio), "Hipofeo – altvalora kuraca kaj frukta planto en Eŭrazio"; M. Landmark (Norvegio), "Pri unu tipo de malfacilaĵo en la lernado de skribado"; J. Pool (Usono), "Elementa modelo por la solvado de la problemo de lingva diverseco"; M.T. Popov (Soveta Unio), "Signaj nombroj kaj magiaj kvadratoj"; W. M.A. de Smet (Belgio), "La balenoj, minacataj gigantoj de la oceanoj"; So Gil-su (Korea Respubliko), "La utopio de Konfucio"; S. Yamazoe (Japanio), "Kio estas prostaglandinoj?"

Nova limdato por Infankongreseto: La limdato por aliĝo al la 16a Internacia Infana Kongreseto estas prokrastita ĝis la 15a de junio 1978. Aliĝiloj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la konstanta adreso de UK kaj ĉe LKK.

Novaj karavanoj: Karavanon el Islando organizas la turisma oficejo de Kjartan Helgason. Informojn provizas Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Rejkjaviko, Islando.

Ne nur Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, sed ankaŭ Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) organizas aŭtomobilan karavanon. Informojn disponigas la vicprezidanto de JEFO, s-ro François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris, Francio.

S-ino Janet Brugos Young kunmetas interesajn antaŭkaj post-kongresajn aranĝojn en Brazilo kaj Soveta Unio. Karavanoj el Frankfurt kaj el pluraj usonaj urboj vojaĝos al la Unua Latin-Amerika Kongreso de Esperanto (Marília, Brazilo, 1978 07 17-22) kaj poste al la UK. Post la UK, eblas aliĝi al unusemajna vizito al Soveta Unio, de Varno al Kievo, Moskvo kaj Lenino. Informojn akiru ĉe s-ino Janet Brugos Young, Esperanto-Fako, 1586 S. Novato Blvd., Novato CA 94947, Usono.

Aliĝis la trimila: Ĝis la 26a de aprilo 1978 registritaj estis precize tri mil kongresanoj, laŭ jena distribuo: Bulgario 1123, Pollando 337, Ĉeĥoslovakio 294, Hungario 203, Francio 159, Finnlando 104, Svedio 81, Germana DR 74, FR Germanio 74, Nederlando 68, Belgio 52, Usono 51, Britio 50, Italio 48, Japanio 42, Jugoslavio 33, Svislando 25, Hispanio 24, Islando 19, Danlando 17, Rumanio 15, Kanado 13, Aŭstralio 11, Norvegio 11, Portugalio 11, Aŭstrio 9, Brazilo 8, Israelo 8, Luksemburgo 8, Nov-Zelando 7, Argentino 5, Soveta Unio 3, po 2 el Greklando, Irlando kaj Korea Respubliko, kaj po 1 el Burundio, Egiptio, Irano, Jemena DR, Sud-Afriko, Urugvajo kaj Zairio.



La kongresejo de la 16a Internacia Infana Kongreseto en Varno: Ĉi tiun scenejon dum la kongresa semajno vivigos plurdeko da infanoj parolantaj la Internacian Lingvon.

Unuiĝintaj Nacioj

- La 4an de aprilo d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, faris en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko prelegon pri la temo "Lingvo kaj la internacia komunikado: la rajto je komunikado". Ambasadoro Ralph Harry, ĉefo de la Aŭstralia Delegitaro ĉe UN faris trafan enkondukon kaj kunhelpis respondi al demandoj en vigla diskuto, kiu sekvis la prelegon. Ĉeestis plurdeko da personoj, inter kiuj ankaŭ pluraj diplomatoj el diversaj landoj. La prelegon organizis Esperanto-Klubo de UN, kiu revigliĝas en la lasta periodo. Menciindas, krome, ke d-ro Tonkin lastatempe renkontiĝis kun kelkaj diplomatoj ĉe UN, kiuj venas el landoj kie la Esperanto-movado spertas nesufiĉan atenton de la aŭtoritatoj.

Soveta Unio

- Esperanto spertas ĉiam pli da atento en la sovetaj amaskomunikiloj. Post la eksperimenta elsendo de Radio Moskvo, komence de februaro (v. nian martan numeron, p. 43), nun la informa semajna gazeto *Moskvaj novaĵoj*, aperanta en la angla, araba, franca kaj hispana lingvoj, en sia numero 10 (2790) de la 11a de marto 1978 publikigis 16-paĝan suplementon en la Internacia Lingvo. Temas pri raporto, kiun la soveta gvidanto Breĵnev faris en oktobro pasintjare pri la projekto de la nova konstitucio de Soveta Unio. Laŭ nekonfirmitaj informoj, en Soveta Unio oni lastatempe serioze konsideras eblecojn de oficiala organiziĝo de la Esperanto-movado, por tiamaniere forigi la absurdan situacion en kiu la lando kun la plej granda nombro de Esperanto-parolantoj jam dum pluraj jardekoj restas sen adekvata organizaĵo por la adeptoj de la Internacia Lingvo.

Brazilo

- La 19an de aprilo, en la Federacia Parlamento en la ĉefurbo Brazilio, deputito Marcelo Linhares (partio Arena de la ŝtato Ceará) faris paroladon okaze de la datreveno de la morto de d-ro Zamenhof. Emfazante la grandecon de la iniciatinto de Esperanto, la deputito skizis la histo-

rion de la Esperantaj lingvo kaj movado kaj atentigis, ke la federacia ĉefurbo de Brazilo gastigos la 66an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 1981. Kvankam en la lando ne ekzistas oficiala parlamenta grupo por Esperanto, inter la deputitoj troviĝas multaj apogantoj kaj eĉ pluraj parolantoj de la Internacia Lingvo.

Hungario

- Pentroarto de Flandrio, kibernetiko, grandaj hungaraj inventistoj, gastronomio, la hungara popolkanto, kurso por E-instruistoj, ekspozicio, ŝakkonkurso, ekskursoj, filmprogramo, koncerto..., tio estas nur parto de la temoj kaj aranĝoj en la kadro de la 16a Somera Esperanto-Universitato (SEU) en Gyula. La 16a SEU okazos inter la 9a kaj 15a de julio ĉi-jare, kaj ne dum la pli fruaj datoj, kiujn ni erare anoncis en nia marta numero, p. 61. Pliajn informojn petu ĉe: TIT-SEU, P.f. 73, H-5701 Gyula, Hungario.

Irano

- La furora interesiĝo en Irano pri Esperanto, kiun nia revuo amplekse prezentis en la decembra kaj januara numeroj, ankoraŭ ĉiam kreskas. Meze de februaro en la Universitato de Teherano komenciĝis la 17a Esperanto-kurso por 170 partoprenantoj. Jam tiutempe enskribiĝis pli ol 750 gestudentoj por la kursoj, kiuj devis komenciĝi en marto, aprilo, majo ktp. Ankaŭ el aliaj iranaj urboj venas multaj petoj pri la instruado de Esperanto. La gazetaro, radio kaj televido anoncas tion kiel unikan eventon en la lastatempa kultura historio de Irano.

Nederlando

- D-ro Rob Vetter, kiu lastatempe regule kontribuas al nia revuo, aperigis tre rimarkindan artikolon pri lingvaj problemoj en Eŭropa Komunumo en *Thd nieuws* (jaro 10, n-ro 13, februaro 1978). La artikolo forte pledas por Esperanto kiel solvo. La periodaĵo por kiu d-ro Vetter verkis la tekston estas eldonata de la Teknika Universitato en Delft, unu el la plej prestiĝaj teknikaj altlernejoj en Eŭropo.



- Ĉinio: Ni jam atentigis, ke la monata revuo "El Popola Ĉinio" lastatempe dediĉas ĉiam pli da spaco al la Esperanto-movado mem. En ĝia maja numero ĉi-jare (Kia modela akurateco!), krom informoj pri la UK en Varno, LPLP, SUK ktp., troviĝas tutpaĝa informo pri la partopreno de esperantistoj en la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. La revuo precizigas, ke inter tiuj esperantistoj troviĝas Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso (= ĉina tutlanda parlamento), kiu estas ankaŭ prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, Je Lajŝi (Ĵelezo), vicprezidanto de ĈEL, Giugi (Orverda) kaj Je Gjungian (Cicio Mar), membroj de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL, Fang Ŝanging (Tikos), veterana esperantisto laboranta en EPĈ, Gin Kemu, profesoro en la Pekina Universitato, kaj Huang Naj, blinda esperantisto. EPĈ diras, ke "kelkaj el ili havis agrablan revidiĝon post la falo de la 'kvarpersona bando' kaj interŝanĝis opiniojn pri antaŭenpuŝo de ĉina esperanta movado". Sur la supra foto, kiun ni represas el EPĈ, de maldekstre: Huang Naj, Fung Ŝanging, Giugi, Je Gjungian kaj Gin Kemu.

Terminaroj


- Minimume tri fakaj terminaroj pretiĝas nuntempe en Hungario. Jam aperis la unua volumo de *Geodezia fakterminaro en ses lingvoj* (angla, Esperanto, franca, germana, hungara kaj rusa), kies sekcion en la Internacia Lingvo prizorgis d-ro Ottó Haszpra. Plurlingva jurista fakvortaro estas jam 80-procente preta. Ĝia kompilanto, d-ro L. Dubravszky (Nemetvolgyi u. 30.A.III., H-1126 Budapest) petas kontaktojn kun fakuloj por helpi en la finredaktaj laboroj. Same, s-ro L. Szilvasi (p/a Hungara Esperanto-Asocio, Poŝtfako 193, H-1368 Budapest) bonvenigus kontaktojn, kiuj helpus finredakti plurlingvan radioamatoran fakvortaron.

Gramofondiskoj

- Svisa kantisto Olivier Tzaut sukcesis en duona jaro vendi pli ol mil ekzemplerojn de sia gramofondisko *Tra l'mondo*, malgraŭ la alta prezo (28,80 gld. ĉe la Libroservo de UEA). Al la bona vendoritmo certe kontribuis ankaŭ la teknikaj kvalitoj de la eldonaĵo (havebla ankaŭ kiel sonkaseto), ĉar ĝi sendube estas teknike kaj grafike unu el la plej senpekaj gramofondiskoj en Esperanto.
- Ankaŭ s-ino Alberta Casey vendis plurajn centojn de sia gramofondisko *Al vi de mi*, kiu, simile al la disko de s-ro Tzaut, havas tre trafan elekton de bone konataj popularaj melodioj. S-ino Casey lastatempe faris specialan interkonsenton kun la Libroservo de UEA, kiu fariĝas la ĉefa distribuanto de la disko kaj do donas rabaton de 33 procentoj por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj, sendotaj al la sama adreso. La prezo: 18,00 gld.

Interlingvistiko

- La 18an de marto, en Barnaul (Soveta Unio), okazis studenta scienca konferenco, kies interlingvistika sekcio traktis jenajn temojn: Ŝekspiro en Esperantaj tradukoj; Problemoj de sintakso en naturaj kaj artefaritaj lingvoj; Rolo de la latina en la kreo de E-gramatiko; Francaj poeziaj tradukoj en Esperanton; Anglaj frazeologiismoj en la internacia lingvo Esperanto.



- Muzeoj: En la hungara urbo Túrkeve, pasintjare kompletigis la esperantigo de la konstanta ekspozicio de la Finta Muzeo. Nun ĉiuj klarigoj pri la ekspoziciaĵoj estas legeblaj en la hungara kaj en Esperanto, dank' al klopodoj de s-ro László Földvári, kiun helpis s-ro K. Fajsz. La muzeo mem estas dediĉita al la vivo kaj verko de la fratoj Sándor kaj Gergely Finta, kiuj naskiĝis en la urbo, por poste akiri mondfamon en la skulptarto. Sándor vivis kaj skulptis i.a. en Brazilo kaj Usono, dum Gergely (artista nomo: Oszkár Zádory) estis lernanto de la fama Rodin kaj pasigis plej multajn jarojn en Parizo.

Persono

Ĝuĝev

- Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev el Bulgario, membro de Akademio de Esperanto, prezidanto de Muzika Espe-



ranto-Ligo kaj preleginto en pluraj sesioj de Internacia Somera Universitato, internacie konata muzikologo, fariĝis laŭreato de la aŭstra ŝtata Premio Herder por la jaro 1978. Ĉi tiun premion, kiu ĝuas internacian

renomon, prof. Ĝuĝev ricevos en aparta solenaĵo la 17an de majo 1978 en Vieno, pro "atingoj en la scienco kaj arto kaj speciale en la muzika etnografio".

Strönne

- S-ro Jan Strönne, komitatano de UEA, ĉesis esti prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio en ties jarkunveno la 22an kaj 23an de aprilo 1978. Strönne plenumis tiun funkcion dum 30 jaroj! Li tamen ne retiriĝis el aktiva partopreno en la Movado, ĉar li restas estrarano de SEF, kiu en la jarkunveno honoris lin per paroladoj kaj transdono de bibliofila ekzemplero de la verko *50 jaroj kun Paul Nylén*. Temas pri la ekzemplero numero 1, kiun en 1942 Strönne transdonis al Nylén mem. La nova prezidanto de SEF fariĝis ing. Roland Lindblom, kiu estas 46-jara.

Jegorovas

- "Internacia jura statuso de UEA" estas la titolo de la diplomtezo, kiun la 31an de marto, en la jura fakultato de la Universitato en Vilnius (Soveta Unio) sukcese defendis s-ro P. Jegorovas, konata landa E-aktivulo.

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1977, p. 66. **Mal-longigoj:** I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840kHz). I.P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I.
18.20-18.30 Lisbono, 49.79m (6025 kHz), 30.80m (9740kHz). I.P. Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, Lisboa 1, Portugalio.
20.00-20.20 Romo, 50.08m (5990 kHz), 41.24m (7275kHz), 30.90m (9710kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190kHz), 41.38m (7250kHz), 31.17m (9625kHz), 31.10m (9645kHz), 25.63m (11705kHz), 19.84m (15120kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30 Lisbono, kiel je 18.20.
23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m

(1400kHz). P. Brazilia Spiritisma Federacio, av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
01.20-01.30 kaj 02.50-03.00, Lisbono, 31.13m (9635kHz), 25.42 m (11840kHz), kiel dimanĉe.
18.00-18.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 31.46m (9535kHz). P. Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.
22.05-22.20 Berno, 75.28m (3985 kHz), 31.46m (9535kHz), 23.60 m (12712kHz), 19.60m (15306 kHz), 16.83m (17825kHz), 13.90 m (21583kHz).

Marde

20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 50.08m (5990kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.
22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

Merkrede

22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

17.50-17.55 Vieno, 203m (1475kHz). I.
18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.05-22.20 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Vendrede

20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m. I.
20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de

Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105kHz). I.P.
18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.05-22.20 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.

b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 31.46m), Lisbono (dimanĉe), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno, Zagrebo, Ibra Radio.

c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Lisbono (lunde en Sud-Ameriko), Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Rio de Janeiro kaj Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Berno (13,90m en Sud-Ameriko).

ĉ) Stacio aŭdebla en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

Ne sufiĉas nur aŭskulti radio-programojn en Esperanto! Necesas foje skribi al la redakcioj. Radio-elsendoj ne havas abonantojn kaj eldonkvantojn por kalkuli. Viaj leteroj estas la sola signo pri la populareco kaj dezirindeco de tiu valora praktika utiligo de la Internacia Lingvo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRAZIL: Gersi Alfredo Bays.

SOCIETO ZAMENHOF 1977

BRAZ: 230 Denise Deslandes.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

FINNL: 141 Vuokko Heinäsuo. FRG: 142 Kurt Schönrich. SVED: 143 Harald Andersson; 144 Szilard Szabad. BELG: 145 André Degryse. BRAZ: 146 Nydia Aydos Krieger. BRIT: 147 E.B. Knight; 148 K. Sly. NED: 149 I. Dijkhoff-Lenze. SVED: 150 Erik Carlén; 151 Frank Carlén; 152 E. Johansson; 153 L. Lagerkrantz; 154 B. Lindström; 155 Olle Olsson. US: 156 Jonathan Pool; 157 Julie Tonkin. HISP: 158 José Castellort i Riba; 159 J. Climent; 160 A. Enriquez de Salamanca. MEKS: 161 H. Vazquez Briones. NED: 162 B. Klappert; 163 Akiko Woessink-Nagata. NOR: 164 Rolf Bugge-

Paulsen. SVED: 165 M. Andreasson. US: 166 Julius Balbin; 167 Milton O. Brown; 168 Frank W. Carruthers; 169 Moshe Lewin; 170 R.R. Schmitt; 171 Wm. H. Schulze; 172 Mark Starr; 173 Martha Walker.

DONACOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 28a de februaro

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: Heredaĵo D.M. Pot 27 604,08.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Britio: B.W.G. Phillips 8,84. FR Germanio: M. Kossolobow 50,00. Sumo 61,14.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: R. Petri 26,56. Svedio: H. Levin 55,72; T. Jansson 55,72. Usono: E-Soc. Ĉikago, memore al H. Tobusch 40,10. Sumo: 584,57.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Donaco anonima: 25,00.

ĜENERALA KASO: Belgio: G. Wolff 1000,00. FR Germanio: F. Liebl 44,75. Italio: S. Martina 13,00. Usono: M. Jones 11,50. Diversaj

malgrandaj: 8,41. Sumo: 1 656,33. PATRONOJ DE TEJO, 1978: 11. M. Jullien, Francio. 12. G. Piciotto De Vita, Italio. 13. F. Swift, Nov-Zelando. 14. H.M. Schippers, Nederlando.

UNESKO-KAMPANJO: FR Germanio: M. Vogel 16,06. Hinda Unio: Memore al S.P. DebGupta 108,75. Sumo: 217,31.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

MALFRUA JARLIBRO

La Jarlibro 1978 malfruas. En la lastaj jaroj ĝi kutime aperis en junio, sed pro pluraj faktoroj — ĉefe longaj malsanoj de la administrantino — la preparoj ĉi-jare eĉ pli malfruiĝis, tiel ke la libro verŝajne aperos nur en julio aŭ eĉ aŭgusto. Al la ekster-eŭropaj membroj ni aparte atentigas, ke la Jarlibro iros al ili per ordinara poŝto, kiel kutime; la ĉi-jara enkonduko de aerpoŝto por la ekstereŭropaj membroj koncernas nur la revuon *Esperanto*.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 19

(pri la demando vidu nian aprilan numeron, p. 89)

1. Marie Hankel (1844-1929), la "Reĝino de la 'Floraj Ludoj'" en 1909, gajnis rozon pro sia poemo "La simbolo de l' amo". Ŝiaj versoj aperis en pluraj Esperanto-periodaĵoj kaj ankaŭ en aparta volumo, *Sabletoj*, eldonita en 1911.

2. Jeanne Flourens (1871-1928) verkis la komediojn *Duonsurda* (1907), *La fianĉiniĝo de sovaĝulineto* (1909) kaj *Geedziĝpeto* (1913). Ŝia novelaro *La senlaca sinofero* aperis en 1912. Ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton verkojn de Alfred de Musset kaj L. Tolstoj.

3. Alice Vanderbilt Morris (1874-1950) interesiĝis pri la internacilingva demando post la unua mondmilito. En 1924 ŝi kunfondis la Internacian Helplingvan Asocion (International Auxiliary Language Association). En la unuaj jaroj de sia ekzisto, IALA subtenis sciencajn esplorojn pri Esperanto kaj publikigis la rezultojn.

4. Margarethe Noll (1874-1962) el Kopenhago, Danlando, havigis al d-ro Zamenhof informojn pri liaj frato kaj filino. Ŝi estis multjara aktivulino en la dana Esperantomovado kaj la ĉefa defendanto de Esperanto kontraŭ la subtenantoj de Ido, inter kiuj estis ŝia samlandano, la fama filologo Otto Jespersen.

5. Ellen Kate Limousin (1879-1950) naskiĝis en Hindujo, kie ŝia patro servis kiel kolonelo en la kolonia armeo. Ŝi iris al Parizo en 1926 por helpi al Eŭgeno Adam (Lanti) en la redakciaj kaj administraj aferoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

6. Julie Šupichová (1884-1970) el Prago eldonis proprakoste ĉeflingvan gazeton de 1920 ĝis 1923. Inter ŝiaj 28 memstaraj verkoj troviĝas lerniloj, konversacia libro kaj infor-

maj publikaĵoj pri Esperanto. Ŝi ankaŭ kunlaboris en la revuo *La progreso*.

7. Julia C. Isbrücker-Dirksen (1887-1971) estis la edzino de ing. J.R.G. Isbrücker, antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto. Krom organiza laboro, ŝi Isbrücker okupiĝis pri instruado, verkado kaj tradukado. Ŝi kaj ŝia edzo tradukis en 1923 *Akbar*, historian rakonton de P. van Limburg Brouwer, kaj ŝi tradukis *La alia pasinteco* (1952), psikologian romanon de R. Bulthuis.

8. Hilda Dresen (1896 -) kontribuis tradukaĵojn el germanlingva poezio al *Svisa antologio* (1929) kaj ĉefredaktis *Estona antologio* (1932). Ŝiaj originalaj poemoj aperis en *Dekdu poetoj* (1934) kaj *Norda naturo* (1967). Lastatempe estis eldonitaj *Kalevipoeg* (1975), ŝia traduko de fragmentoj el la estona popola epopo, kaj la antologia volumo *Estona soveta poezio* (1977), en ŝiaj elekto kaj traduko.

9. Lidja Zamenhof (1904-1943), la pli juna el la du filinoj de d-ro Zamenhof, okupiĝis pri la instruado de Esperanto kaj ankaŭ pri organizaj aferoj. Cetere, ŝi tradukis beletrajn

verkojn de polaj aŭtoroj en Esperanton kaj ankaŭ la plej gravajn verkojn pri la bahaismo.

10. Marjorie Boulton (1924 -) estis elektita al la Akademio de Esperanto en 1967. Ŝiaj originalaj poemoj troviĝas en la kolektoj *Kontralte* (1955), *Cent ĝojkantoj* (1957) kaj *Eroj* (1959). Ŝia novelaro *Okuloj* aperis en 1967, la drama volumo *Virino ĉe la landlimo* en 1959, kaj la biografio *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* en 1963. Lastatempe estis eldonita *Rimletero* (1976), kolekto de versaj korespondaĵoj inter ŝi kaj William Auld.

DEMANDO 20

(la respondo aperos en nia julia/aŭgusta numero)

La ĉi-monata demando temas pri literatura geografio aŭ geografia literaturo. Jen kvin priskriboj de naturaj ĉirkaŭaĵoj, kiujn Esperantaj aŭtoroj vidis aŭ imagis. Du lokoj estas en Eŭropo; inter la ceteraj, po unu estas en Afriko, Sud-Ameriko kaj Oceanio. Ĉu vi scias la nomojn de la aŭtoroj kaj verkoj? Jen helpilo: inter la aŭtoroj troviĝas aŭstraliano, finnino, franco, jugoslavo kaj ruso.

1. "... Matene netaj kaj bluaj estas la ombroj, sed grade laŭ la supreniro de la suno, ili malaperas kaj la konturoj de la dunoj stompiĝas. La ondoliniaj pintmontoj kaose svarmas kun rebriloj flavaj, rozaj, ruĝaj. Poste la krestoj glimlumas kun rava orton kaj eligas kvazaŭ blondan fumon. Estas la vento, kiu, senĉesa laboranto, skrapetas la plejaltaĵojn kaj forbalaas la subtilan sablopolvon. Vespere, kiam subiras la suno, venas la 'malva horo', la mire bela horo. Antaŭ ol ili estos sorbitaj de la nokto la silentaj kaj senvivaj dunoj sin ornamas per tiel milda nuanco, ke ili mienas ne plu timigaj. Ili ŝajnas sin interfrapi kiel furiozaj ondegoj, nun ili kvietiĝas, lutiĝas al senforma kaj rigida maso, kiu transruĝiĝas, nigriĝas kaj foriĝas. ..."

2. "... La printempo venas per forto kaj viglo, la suno alproksimiĝas ĉiun tagon pli varma kaj pli kaj pli heligas la noktojn. Per nekredibla rapideco degelas la neĝamasegoj sur la sudaj montdeklivoj kaj la riveretoj transbordiĝas. La printempaj akvoj kantas kaj murmuras ĉiufanke, ĵetante sin gaje supren laŭlonge de la deklivoj. La migrantaj birdoj — de la majesta kantcigno ĝis la plej eta regolo — revenas en sian

nordan hejmlandon. Iliaj jubilaj sunkantatoj aŭdiĝas ĉie, sur deklivoj, ĉe lagobordoj, en arbaroj. La tuta naturo jubilas kaj triumfas pro tio, ke la suno kaj lumo venkis. ... La betuloj ekricevas en malmultaj tagoj novan bonodoran dolĉeverdan foliaron. ... la zumado de la milionoj da malsataj kuloj, ree sonas en la arbaroj, tiel ke boacaroj fuĝas pro tiuj sangosoifaj bestetoj en la montpintan venton."

3. "Forlasinte la kakaoplanejojn, ni eniris la ĝangalon laŭ herbe tapiŝita vojo, pli konvene priskribita kiel tunelo pro tio, ke la ĝangalo formis arkaĵon super preskaŭ ĝia tuta longo. La trapaso de la veturilo sur la herbaĵo ŝajnis strange kvietaj kaj facila, simile al la moviĝo de glitveturilo sur neĝo.

Ĉi tiu rava vojo serpentumis la ĝangalon per neniam ĉesantaj turniĝoj — en multaj lokoj la kreskaĵoj samtempe brosis ambaŭ flankojn de la veturilo. La plej granda parto de la vojo kuŝis sub la ombro, sed jen kaj jen radio de sunlumo penetris la supran verdan baldakenon, hele lumigante parton de la suba verda tapiŝo.

Fine la ĝangala vojo subite plilarĝiĝis, tiel vaste fendante la altan baldakenon, ke la sunlumo trafluis, inundante la nun senherban teron kaj ĉiufanke aperantajn indiĝenajn loĝejojn."

4. "Hieraŭ nokte furiozis la ŝtormo. De post Stettin, tuj post kiam ĝi postlasis la labirinton de l' fajroj, la

ŝtala belulo trafis potencon ĉirkaŭprenon de la ŝtormo. La kolerega ciklono kaptis ĝian bruston per la larĝa mantelo, kun sovaĝa ĝemego kontraŭbatante sur pintojn de la mastoj kaj tamburante sur la ferdekojn grandajn gutojn de la pluvo. La furioziĝinta maro estis ĵetanta pezajn tavolojn de l' akvo en hermetike ŝlositajn vitrojn de l' iluminiloj, superverŝante ilin per rapide ruliĝantaj larmoj. Kuntirinte la fortojn kaj sin streĉinte, ĝi suprenĵetis la malvarmajn kaj glitajn brakojn ĝis la rando de l' ŝipbordo. Ĝi alkroĉiĝis al la balustrado kaj kun tondrego faladis, disfluis sur la ferdekoj, ĉirkaŭlavante vandetojn de l' kabinoj."

5. "La sekvinta tago komenciĝis trankvile kaj kun helega suno, kiu blindige briligis la blankan surfacon de la neĝkovrita kampo nin ĉirkaŭanta. La nigraj okulŝirmiloj estis nesufiĉaj, ĉar malgraŭ ili ni devis marŝadi kun la okuloj preskaŭ fermitaj. ... La lasta parto estas sufiĉe kruta deklivo, semita per rokoj, kiujn oni devas surgrimpi uzante la fortojn de la manoj. ... Generale tiu deklivo havas restaĵojn de neĝo, kaj foje tute malhavas ĝin. ... ni havis la malbonŝancon trovi ĝin tute kovrita per neĝo, kies dikeco kelkloke atingis du metrojn, kaj el kiu izole elstaris la plej grandaj rokoj. La neĝo, sub la efiko de la tagmeza suno estis mola, kaj foje ni eniĝadis en ĝin ĝiskole; subite ni staris je la bazo de roko, kiu ĝis tiam estis nevidebla pro la neĝo kiu ĝin kovradis, kaj kiun oni devas suprengrimpi."

Anoncetoj

La aŭstria ministro pri eksteraj aferoj favore prijuĝis mian broŝuron n-ro 4 *Instigoj al nova monda ekonomio-ordo kaj efika helpo al evoluiĝo*. Prijuĝu ĝin ankaŭ vi! Pagu öS 54,- al poŝtgirkonto 7 503.218 Vieno d-ro J. Hartl aŭ mendu ĉe UEA.

Naturistoj/Nudistoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Bonvolu peti informojn ĉe: Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Aparta ornamajo: poŝ-sunhorloĝoj sen kompasoj, laŭ historiaj modeloj. Bonvolu peti prospekton ĉe: Wolfgang Zerahn, Lindenweg 18, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Optimala Esperanto-Ortografio, laŭetimologia, sen "ĉapelitaj" literoj (aŭtoro: A. Lienhardt). Prezo: 9,00 gld., ĉe la Libroservo de UEA.

Geamikojn de la paco serĉas la sekcio de la Mondpaca Esperanto-Movado en la tuta Federacia Respubliko Germanujo. Skribu baldaŭ al MEM-sekcio en Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 Elmstein-2, (ĉef-sekretario Roland H. Hegen).

Gesamseksamuloj — ekestas nova Ligo por vi. Por informoj sendu respondkuponon al s-ro Peter Danning, 44 Morley Road, Twickenham, Anglio TW1 2HF. Konfidenco respektota.

Halina~ Dokumento

PRI LA STUDENTAJ JAROJ DE ZAMENHOF

konsistanta el tajpkopioj de la ruslingvaj originaloj ĉe Gimnazio kaj Universitato Varsoviaj kaj ilia Esperanta traduko. Tiun valoran dokumentaron pri la vivo de Zamenhof sendis en 1934 Halina Edelbaum el Varsovio al Ĵ. Iŭaŝita en Tokio.

Nun aperas fotorepreso de tiuj dokumentoj kun komentario de Naokazu Kawasaki, akademiano.

230+22 paĝoj, 24x17,5cm. Eldonis: Ĵuntaro Iŭaŝita, 1977.

Mendu ĉe UEA: 45,60 (por Nederlando 47,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Esperantistoj, kiuj vojaĝos al la
TUTMONDA FUTBALA KONKURO
en Argentino, bonvolu kontakti nin
persone aŭ koresponde en:
BUENOS AIRES: Bonaera Esperanto-
Asocio, Paraguay 2357; tel.: 83-4302
ROSARIO: Rosaria E-Asocio, Santa Fe
955; tel.: 21/9712 — 3/3606
CÓRDOBA: Kordoba E-Asocio, Hum-
berto I, 150, loc. 21/23; tel.: 71/6299.

Pensu pri beleco

uzante sur viaj ko-
respondaĵoj la al-
logan trikoloran
glumarkon! Cent
markoj kostas 8,25
(por Nederl. 9,60)
gld., kio inkluzivas
la sendokostojn.



Mendu ĉe via landa
libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Rotterdam.

GLUMARKO de la
ĉi-jara TEJO-Kon-
greso estas bela,
dukolora (ora
kaj verda),
travidebla
kaj — men-
dinda.

Dek
glumarkoj
kostas 2,25
(Ned. 2,66) gld.
(aŭ 3 irpk.) inkl.
sendokostojn. Mendu
ĉe la Libroservo de UEA.



HELSINGÖR 1978

La Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj, la 46aj
sinsekve, okazos de la 23a ĝis la 29a de julio en
la Internacia Altlernejo de Helsingör, Danlando.
Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseb-
lajn tagojn en internacia rondo. Kaptu la okazon
komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo.
Programo senpage havebla ĉe:

S-ino Eva Langkilde
Ingemannsvej 18,
DK-3000 Helsingör, Danlando.

PADERBORNAJ FLUGKARAVANOJ AL LA 63a UNIVERSALA KONGRESO

De Bruselo, Vieno, Zürich, Frankfurt,
Amsterdam, London, Parizo, Kopenhago,
Stockholm, Milano kaj Romo vi povas
FLUGI AL VARNIO. Prezoj: inter 300
kaj 510 germanaj markoj. Partoprenu en
nia flugkaravano! Petu informilon ĉe:
Esperanto-Centro, Poŝtfako 1450, D-479
PADERBORN, Fed. Resp. Germanio.

300 gastigejoj

pere de la Pasporta Servo

Tiom da esperantistoj en pli ol 40 landoj pretos
senpage gastigi vin. Listigas 300 adresojn la ĵus
aperinta "Listo de gastigantoj 1978" de la Pas-
porta Servo de TEJO. Aĉetante tiun libron (15
francaj frankoj aŭ 10 irpk.) oni aŭtomate aliĝas
al la servo. Mendoj kaj detaloj ĉe: J.-M. Cash, 9,
rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi,
Francio. Pĉk. 25 426-58 Paris.

POLA ESPERANTO-ASOCIO

invitas vin al:

Internacia Kurso por Esperanto-Instruistoj

(Bydgoszcz, 1978 06 29 – 07 17)

Internacia Esperanto-Feriado por Popollernejanoj

(Zniń/Bydgoszcz, 1978 06 22 – 07 06)

Internacia Esperanto-Feriado por Mezlernejanoj

(Bydgoszcz, 1978 07 06 – 20)

Somera Esperanto-Lernejo

(Władisławowo, ĉe Balta Maro, 1978 08 15 – 29)

Internacia Esperanto-Feriado por Mezlernejanoj

(Tleń, 1978 08 10 – 30)

Aŭtuna Esperanto-Lernejo

(Toruń, 1978 10 02 – 16 kaj 1978 10 16 – 30)


Kvara Internacia Foiro de Esperanto-Turismo

(Varsovio-Toruń-Bydgoszcz-Zakopane, 1978 11 27 – 12 03)

La kotizo por ĉiu el la menciitaj aranĝoj estas nuraj **220 guldonoj**, inkluzive de ĉiuj kostoj de loĝado, manĝoj, ekskursoj kaj programo. Ĉiuj aliĝintoj ĉe UEA ricevos liberigon de la deviga monŝanĝo en Pollando.

Aliĝu ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, plej malfrue unu monaton antaŭ la koncerna aranĝo. Indiku la deziratan aranĝon kaj ties datojn sur la pagilo.

Se vi volas detale informiĝi pri iu el la supre menciitaj aranĝoj, ne skribu tiucele al UEA sed al Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1, Pollando, aŭ al: Juventur, Jagiellońska 12, PL-85-067 Bydgoszcz, Pollando. Bonvolu noti, ke UEA nur peras la aliĝkotizojn por la supre menciitaj aranĝoj.



Ĉi tiu ornamaĵo konsistas el la vorto "Muhammad" (kvarfoje) en la skribo "Kū fi". Ĝi mem sufiĉe diras pri

la ĉefa enhavo de la volumo, en kiu la tradukinto de **LA NOBLA KORANO**



prezentas la vivon de la centra figuro de Islamo kaj ĝenerale klopodas proksimigi al ni la islamajn penson kaj kulturon.

Eldonis: TK, Antverpeno, 1978. 362p.

21cm. ISBN 90 6336 003 7. Prezo:

33,00 (por Ned. 34,32) gld., plus 10%

sendokostoj. La ĉefa distribuejo: UEA.

JE LA FLANKO DE LA PROFETO

de Italo Chiussi estas la 12a volumo en la prestiĝa eldonserio **ORIENTO-OKCIDENTO**, sub aŭspicio de UEA,

en la granda projekto de Unesko por la reciproka aprezado de la kulturoj de la Oriento kaj Okcidento. Jam elĉerpiĝis pluraj el la verkoj antaŭe aperintaj en la serio, kio estas bona rekomendo ankaŭ por ĉi tiu valorajo, kiu al la internacia legantaro klopodas deĉifri la mondon de Islamo. La verko de Chiussi estus fierajo ankaŭ por ĉiu nacia kulturo.

**italo
chiussi**

**je
la flanko
de
la profeto**